

n. bartelmes

mia vivo
*
artikolaro
*
poemaro
*

Broŝurservo de S.A.T. - "Laŭtel"
Cercle espérantiste de l'Agenais
F 47340 Laroque Timbaut

n. bartelmes

mia vivo
*
artikolaro
*
poemaro
*

Broŝurservo de S.A.T. - "Laŭte!"
Cercle espérantiste de l'Agenais
F 47340 Laroque Timbaut

MIA VIVO

Kelkaj SAT-gekomaradoj insiste petis min verki autobiografion.

Mi nur hezite akceptis plenumi tiun peton, ĉar laŭ famaj modeloj tia priskribo de la propra vivo, eĉ se plej sincere redaktata, povas tamen foje esti falsan impreson ĉe legantoj: iuj faktoj aperas al ili gravegaj, neordinaraj, dum aliaj por mi pli esencaj perdas je koloro en la skribaĵo.

Mi do nur povas esperi, ke, sekvante la ĝentilan inviton de tiuj geamikoj al verkado, mi restas kiel eble plej fidela al la memportreto de mi prezentata... fizike, kiam mi rigardas en spegulon, kaj psike, se mi analizas mian animstaton, miajn kapablojn kaj tendencojn.

La sola garantio pri vereco estas la sincereco de la portretisto.

Por la fantaziemo kaj revemo de l'romanverkisto aŭ de l'kongresparolanto, kiu flugas transen al novaj horizontoj!

°°

Mi naskiĝis la 19-an de februaro 1897 en centra (aŭ ĉu okcidenta) Eŭropo, en Düsseldorf, urbo apud la Rejno, kiu unu jarcenton pli frue havis la honoron esti la naskiĝ-urbo de la lirikisto Henriko Heine.

Ŝajnas ke la preskaŭ trijara vivado en la aĉro de l'deknaŭa jarcento lasis spuron sur mi; neniam mi povis liberigi min el romantikemo, el tiu skolo, kiu kulminis en tiu 19-a jarcento kaj ĵetis siajn

reflektojn sur ĉiujn samtempulojn.

Patraflanke mi estis ido de multgeneracia artista familio; mia avo estis kuprogravuristo, mia patro pentristo, ĉefe de portretoj.

Mi tuj diru, ke li ĉiam havis sufiĉe da mendoj je portretoj, tiel ke ni tri infanoj, mia fratino, mia frato kaj mi (la plej aĝa) neniam suferis materialan mankon, se oni esceptas la terurajn militjarojn kaj plurajn jarojn poste (1919-1924), en kiuj ne eblis kontentigi la minimumajn manĝobezonojn. Kiam al mia patro mankis portretmendo el riĉaj familioj, lia peniko, post zorga desegnado, elsorĉis belajn akvarelojn, ĉefe pejzaĝojn, ĉiam en miniatura formato. Dume la oleopentritaj portretoj ricevis multfoje luksan kadron kaj tre ofte okupis grandan spacon.

Kvankam artamanta depost mia plej frua aĝo, mi ne heredis la pentrotalenton de patro kaj prapatro; nur kiel sesjarulo mi lertis en tiu arto ĉar okazis, ke en tiu unua lerneja jaro la instruisto demandis, kiu knabo povus desegni katon sur la nigra tabulo. Mi tuj eksaltis, desegnis tre fidelimite la katon kaj havis la aplaudon de la tuta klasanaro.

Mia arta inklino disvolviĝis en la direkto al muziko kaj literatura verkado. La patrino antaŭ la edziniĝo (en 1895) ĝuis bonegan muzikinstruon (konservatorian), kaj ŝi ludis pianon tre bone. Ankoraŭ mi ne finis la sesan vivjaron, kiam ŝi lernigis al mi la muziknotojn kaj la ludon de malgrandaj muzikaĵoj, tiel ke la 5-jara bubo prezentis en societo ĉe kristnasko 1902 sian lernitaĵon.

El tiu jaro datiĝas arkaŭ mia unua firme restinta impresio pri eksterhejma okazintaĵo: vizito al la Universala Ekspozicio, kiu en Düsseldorf okazis dum la jaro 1902. Forte impresis min la belegaj novaj vagonoj de la Germana Fervojo kiuj estis vere luksaj kompare kun tiuj, kiuj cirkulis ĝis tiam tra la imperio. Krome estis tre amuza glitvojo sur kiu kanotoj rapidegis malsupren en artefaritan lagon; kaj estis imititaj kavernoj, tra kiuj fluis rivereto, sur kiu ni boatveturis. Generale mi estis sufiĉe timema knabo, sed mi opiniis, ke en tiu okazaĵo mi ne havis

timsenton, supozeble pro la ĉeesto de la gepatroj, je kies absoluta tutpoveco mi neniam dubis.

... Krome mi memoras ankoraŭ malnete pri la tramveturiloj, kiuj kurante sur reloj estis tirataj de ĉevaloj. Iom poste venis la revolucio de l'elektro, kaj ni ne plu vidis tiajn ĉevaltramojn.

Ni loĝis ĝis novembro 1905 en tria etaĝo de por tiu tempo granda ludomo, kiu iom transformita hodiaŭ ankoraŭ ekzistas en bela bulvardo eliranta de la stacidomo, kiu tiam portis la nomon de la imperiestro Vilhelmo kaj fine estis transbaptita je la nomo de la unua respublika prezidento Frederiko Ebert. Ni havis tie almenaŭ du grandajn ĉambrojn, krom kuirujo kaj flankaj ĉambretoj. Sed kun la pligrandiĝo de ni tri infanoj la gepatroj decidis investi la ŝparitan monon en propran domon, tre proksime de la stacidomo, - strato enloĝita ĉefe de la artpentristoj. Ĝi estis duetaĝa, havis vastan kelon kaj subtegmentaĵon. Kaj precipe en la malantaŭo troviĝis ĝardeno, trans kies limmuron oni vidis ankoraŭ tre malproksimen en verdaĵon (dometo de plantkultivisto ĉirkaŭita de plantaĵoj, precipe floroj por la vendo).

Ne daŭris longe, ĝis instaliĝis en nia ĝardeno gimnastikiloj, trapezo kaj balanciloj. Mi mem ne estis sportema kiel infano, mi preferis la legadon, kaj oni devis insisti por ke mi ludu kun la gefratoj en la ĝardeno. Precipe mia fratino ĝuis la gimnastikadon, eĉ profesie ŝi kelkan tempon estis sportinstruistino.

Miaj gepatroj atentis, ke ni havu tre regulan vivon. Ni leviĝis relative frue matene, sed enlitiĝis je la 19-a vespere. Kaj tiam kiel tre bela memoraĵo konserviĝis al mi la vespera duet-kantado de miaj gepatroj (la patrino akompanis piane) - temis precipe pri duetoj de Schumann, Schubert kaj Mendelssohn, poste ankaŭ Hugo Wolf kaj Brahms.

Tio estis nia lulkanto, kaj nia ekdormo venis dum tiu ĉi voĉkoncertado de la amataj estaĵoj.

... Post trijara antaŭlerneja tempo (preparaj jaroj por la gimnazio, - ĉiuj klasoj troviĝis kune en la sama konstruaĵo) - mi iĝis lernanto de gimnazio,

humanista alo, do kun la antikvaj lingvoj, paskon 1906, kaj mi fidele vizitis tiun duagradan lernejon ĝis la dato de l'militeksplodo, je la 1-a de aŭgusto 1914. Kaj la 4-an kaj 5-an de aŭgusto mi trapasis la abiturientan ekzamenon, duonjaron pli frue ol en normala periodo, kiel 17-jarulo, kies ateston pri sukceso mi ricevis nur principe, je kondiĉo de voloŝtuliĝo ĉe la armeo.

Mia juda klaskamarado kaj intima amiko kaj mi mem ne plenumis tiun kondiĉon, ĉar ni jam estis konvinkitaj pacistoj. Sed pri tio poste ...

Mi havas entute agrablajn memorojn pri la lernejoj. Mi spertis pli aĝajn kaj rigorajn profesorojn (ili havis ĉu titolon "doktoro", ĉu "profesoro"), kaj ankaŭ kelkajn pli junajn, komprenemajn, al kiuj oni povis fidi kiel al helpemaj amikoj, ne riskante perfidon. Mia profesoro pri franca lingvo estis la plej simpata.

Mi neniam estis inter la ambiciuloj, kiuj celis atingi la unuajn lokojn; mi restis ĉiam mezbona lernanto, kaj la instruistoj havis foje la impreson, ke mia manko de ambicio egalas indiferenton. Mia cerbo ne bone asimilis la matematikon kaj fizikon, sed ja la lingvojn. Sekve ne ĝenis min, kiam mi eksciis en aŭtuno 1910 (kiel dektri-jarulo) pri la ekzisto de Esperanto, ekstudi tiun artefaritan lingvon, kiu fascinis min, apud la latina, la greka, la franca kaj la angla, kiun lastan mi ne devige ankaŭ akceptis en mian lernejan programon; krome sabatvespere estis en la lernejo kurso pri stenografio, kiun mi sekvis.

Kaj por ne tute flankelasi la sportadon, ni starigis naĝklubon el samklasanoj, - nur kelkaj lernantoj, kvin aŭ ses, kiuj ne nur iris komune al naĝejo, sed ankaŭ havis regulajn kunvenojn, statuton, ktp; tiuj kunvenoj okazis en kafejo, kiun tenis la patro de unu el la membroj. Mia amiko protokolis en la kunvenoj!... Tio ŝajnis al ni pli grava ol la naĝado mem. Mi ne estis religiema, nek miaj gepatroj, nek miaj gefratoj. La arto estis mia ligilo kun la plejnoblo en la universo. Tamen, laŭkonvencie, mi partoprenis la protestantan kateĥisman instruon por esti konfirmata (1911).

Ĉe la leciono mi mure miris - same kiel la aliaj knaboj - kiam tiu larĝsultra, altstatura pastoro kun la ruĝblonda barbo fermis siajn okulojn kaj prononcis malrapide preĝformulon en kvazaŭ ekstaza stato.

Cetere tuj post reveno el militkaptiteco (oktobro 1919) mi ĉe juĝoficejo deklaris mian eksiĝon el la eklezio, kiel multaj socialistoj faris en tiu tempo.

Nu, pri Esperanto mia fervoro estis daŭre kreskanta, kaj mi faris kvazaŭ kulton al la personeco de Zamenhof; la 2-an de junio, tago de la publikigo de la unua broŝuro pri Esperanto en Rusio, mi fiksis sur betulo troviĝanta en la fundo de nia ĝardeno la portreton de Zamenhof kaj antaŭ ĝi metis kandeleton, kaj mi devigis mian fratinton kaj ŝian amikinton solene defili tra la ĝardeno. Baldaŭ mi vizitis regule la "burĝan" grupon kaj mi lertiĝis en la konversacio precipe dank'al S-ro Poensgen (kiu ne ĝisvivis la duan militon kaj mortis pro ftizo en svisa kuraĉloko). Kun li mi faris dimanĉajn ekskursojn, dum kiuj oni uzis nur la esperantan lingvon.

Mia hebrea klaskamarado kaj intima amiko Hans Israel cedis al mia insisto kaj eklernis Esperanton; tamen li neniam sindonis kiel mi mem al tiu afero kaj neniam aniĝis al esperantista grupo. Sed kun li mi maturigis mian pensadon eksterlernejan; dum niaj longaj promenoj ni filozofadis dum horoj kaj horoj kaj akiris al ni lukte nian mondkoncepton racionalisman kaj materialisman. Nian negativan sintenon rilate dion kaj religion plifortigis la spertoj de la mondmilito, post kies drameca fino mi faris la formalan paŝon de eksiĝo el eklezio (protestanta). Cetere la amas-eksiĝoj tiutempaj estis signifoplenaj; ili iris sampaŝe kun la revoluciigo (politika) de la mensoj.

Sed antaŭmilite jam naskiĝis en mia menso la ideo de traduko de la Goethe-a "Faust"-tragedio. Kelkajn fragmentojn mi transskribis en kajerojn, kiujn mi poste utiligis, kiam mi entreprenis la tradukon de la tuta unua parto de "Faŭsto". Tie mi vere elprovis

mian tradukkapablon de poezio.

Originala verkado de poezio en Esperanto - kiu esperantisto ne estus tentata de tiu farado - ankaŭ logis min, kaj mi devas diri, ke tute senpene kiel 16-jarulo mi produktis tutan aron de ampoemoj tute naivaj kaj simplalingvaj, tute platonaj, al knabo adorata, kiu estis en la klaso de mia frato, tri klasojn sube de mi, tri jarojn pli juna.

Jam estante dektri-jara mi komencis adori tiun blondan knabeton, kaj deksex-jara mi ofte frekventis lian hejmon, kie li estis sol-infano.

Nur lia samaĝa kuzo estis ofte tie, kiam mi faris miajn vizitojn. Sed antaŭ la eksplodo de la mondmilito nia amikeco disbloviĝis pro iuj banalaj cirkonstancoj, kiuj malebligis daŭrigon de la amikaj kontaktoj, - kaj en la kirlado de l'militjaroj perdiĝis ĉia rilato, tiagrade ke mi neniam eksciis, kio fariĝis el li, kaj ĉu li transvivis la mondkatastrofon.

El la antaŭmilita esperantista vivo en Düsseldorf restas bonmemore al mi du eventoj : unu estis parolado kun lumbildoj de S-ro Parrish pri Kalifornio en la popoldomo, la dua estis vizito, en la jaro 1911, al ekspozicio de la Laborista Grupo Esperantista instalita en restoracio. Fakte estis mia unua kontakto kun laborist-esperantistoj ! (Mi estis 14-jara). Ankaŭ ĉirkaŭ tiu tempo mi komencis interesiĝi pri politikaj kaj sociaj problemoj. En 1912 estis parlament-elektoj en imperia Germanio, kaj tiun ĉi fojon la socialdemokratio akiris grandegan venkon; mi miksiĝis inter la popolo antaŭ la stacidomo, kie oni atendis la balotrezultatojn lumigitite montrataj sur la tegmento de domego. Kun la laboristoj mi aplaudis la triumfon de l'socialdemokrata elektito.

Flanke de la lerneja studado, sufiĉe peza kaj streĉa, mi perfektigis min, helpate de la bona patrino, en pianludo, kaj la sonatoj de Bethoveno kaj la Nokturnoj de Sopeno ne plu havis sekreton por mi. Krome tre grandan ĝuon havigis al mi (kaj al panjo, kiu registris miajn konstantajn progresojn sur tiu kampo) la kvarmana pianludo kun ŝi. Ne estis tiom

la ekzakta plenumo de la ludaĵo, kiom la absoluta anima kongruo kaj muzika koncepto, kiu efikis en tiu ludado; patrino kaj filo revadis laŭ sama maniero forportate de la belaj harmonioj. Inter la plej belaj memoroj pri mia patrino estas tiu komuna pianludado... ĝi daŭris, ja ofte kun grandaj interrompoj ! - ĝis ŝia morto en majo 1958 (ŝi fariĝis 85-jara.)

Grandan ĝojon donis al mi la fakto, ke Hektor Hodler akceptis miajn du tradukaĵojn el germanaj gazetoj pri Pacismo por apero en "Esperanto" (UEA). Unu aperis en 1912, la dua en 1913. La esperanta adapto de l'Gabelsbergera stenografi-sistemo fare de Schramm plaĉis al mi (ja mi konis jam la originalan sistemon); mi ellernis ĝin, same mia klas-kamarado Hans, kaj ni ambaŭ partoprenis konkurson en Esp. stenografio okaze de la mondkongreso de l' Gabelsbergeranoj en Düsseldorf, fine de julio 1914 (Ni ricevis diplomojn.)

Sed ve ! Ĝuste en la mezo de tiuj kongresaj tagoj venis la militdeklaro de Aŭstrio al Serbio, kaj la aŭstria kongresanoj, sufiĉe nombraj, abrupte devis forlasi la kongreson. Angoraj tagoj por ni junaj homoj, precipe mia amiko kaj mi, kiuj estis redaktintaj en la lasta lerneja jaro, kiam oni postulis verkaĵon pri la neceso de militoj, tezon kontraŭan al tiu de la naciistaj edukistoj, nome re-futantan interpopolan bataladon kaj malamon.

Ni do estis la du solaj el nia klaso, kiuj rifuzis volontuliĝi; sed mi laboris unu semajnon en oficejo, kie oni kompilis slipojn pri la jam mortintaj aŭ vunditaj soldatoj. Kaj tiam mia juna instruisto pri natursciencoj venis por rekruti min por civilservo, helpo en milithospitalo (bazante sin sur la fakto, ke en la ĵus pasinta somero mi estis partopreninta kurson pri unua helpo al akcidentitoj). Aŭtomobile mi estis rapide transportita al Liège, kie en la Universitato estis instalita provizora milithospitalo. Ĉiuj ĉambregoj jam estis plenplenaj de grave vunditaj soldatoj, eĉ la cementaj ŝtuparoj kaj vestibloj; tiuj viktimoj venis el

bataloj en Brabanto. Mi kredis min translokita en inferon ! Unuafaje en mia vivo mi vidis mortintojn, kaj ĉi tie mortaciis ĉiutage pluraj dekoj, ofte pro tetan-infekto. Estis belegaj junaj homoj, inter 1,80 kaj 2 metroj altaj, kiuj servis ĉe la prusa gvardio, elit-regimentoj, kiuj agoniis ĉi tie inter niaj manoj. Mi havis nokt-deĵoron ĉe agonianto, kiu matene estis finsuferinta, mi transportis brankardojn kun kadavroj, mi ĉeestis en la operacia ĉambro, tenante maskon kun kloroformo super vizaĝo, mi malofte dormis kelkajn horojn kaj mi admiris la profesiajn flegistinojn, kiuj senlace sin okupis provante regi la situacion.

Sed post 12 tagoj mi kolapsis; miaj nervoj ne plu eltenis tiun vivon, nek miaj fizikaj fortoj; mi ja estis nur 17-jara. Oni rekondukis min aŭtomobile al Düsseldorf, kie mi restis en lito dum pluraj tagoj por malrapide retrovi la ekvilibron.

Necesis nun elekti profesion. Ĉar unu onklo mia (li mortis en oktobro 1914, sekve de vundiĝo ĉe la batalo de la Marno) estis bankdirektoro, la gepatroj konsilis al mi eklerni la bankprofesion en tiu instituto, kie estis farinta sian karieron mia onklo. Mi do fariĝis bankofica lernanto la unuan de oktobro 1914. Mi povis sekvi la lernadon preskaŭ du jarojn; ja unu fojon en 1915 oni provis rekruti min por la armeo, sed mi eskapis ĉe la ekzameno sub preteksto de nerva malforteco (mi tamen havis tre solidan kordon !).

Nu, la duan fojon mi ne havis tiun ŝancon, kaj la 15-an de septembro 1916 mi soldatiĝis kaj pasigis ses terurajn monatojn en kazerno de Saarlouis. Estis unu el la plej malvarmaj vintroj, kiujn mi konis dum mia vivo, kaj oni torturis nin ĉiamaniere, igante nin marŝadi kaj ekzercadi en neĝ-uraganoj kaj kuŝiĝi surventre sur glaciigitaj terenoj. Kaŭrante ni devis teni antaŭ ni dum longaj minutoj la fusilon kun streĉitaj brakoj. Mi ludis kun la ideo pri memmortigo... sed en la Kristnaskaj festotagoj alvenis la gepatroj kaj konsolis min. Alia konsolo konsistis en tio, ke mi povis ludi pianon sur belega instrumento, kiu staris en unuakategoria kafejo; tie pagante pecon da ku-

ko kun kafo mi rajtis muzikludi laŭplaĉe. Unuhora mirakla fuĝo el la kruela realo de la kazerna turmento !

Mi ŝparas al vi rakonti detale pri mia transportiĝo al Francio en aprilo 1917, tranĉea milito en la someraj monatoj de tiu jaro (ĉe Sinjorina Vojo), grize vestita nulo en la mezo de koto, pulvodoro kaj kadavroj duonnudigitaj.

Du tagojn post eksplodo de la Oktobra Revolucio, nome la 9-an de novembro 1917, mi alvenis en Rusio, en regiono neĝkovrita, kiu apartenas hodiaŭ al Polio.

Ni enfosiĝis en kavaĵoj sufiĉe profundaj por ŝirmi nin kontraŭ la frostego; por lavi nin kaj havi akvon por kuiri ni devis rompi glacitavolon. Ni saltis (necesis lertmoveco) sur preterruliĝantaj trajnojn, por rabi terpomojn, kiuj konsistigis ekstran manĝporcion. Neniu batalego atendis nin... feliĉe, ĉar la rusa armeo rezignis daŭrigi la militadon. Mi memoras pri la parado, kiu estis aranĝita por la naskiĝtago de Vilhelmo II, la 27-an de januaro 1918, en granda placo sub neĝo. Mi ne partoprenis tiun honorigon al la militĉefo, ĉar mi ne ellernis ĵeti sufiĉe alten miajn krurojn por la paradmarŝo. Kompense mi balais la neĝon antaŭ la lignobarakaro.

Unu vesperon mi faris 40-minutan marŝadon penigan tra neĝamasoj ĝis proksima vilaĝo, kie laŭdire troviĝis piano. Efektive mi trovis ĝin en funkovrita trinkejo, kaj malgraŭ la bruo de l'soldataj klientoj mi sukcesis ludi duonhoron por mia intima plezuro.

Mi ankaŭ memoras bonakcepton kun tetrinkado ĉe juda familio en Baranoviĉi; estis ĉirkaŭ la fino de mia tiea restado, kaj regis degela vetero. Meze de februaro ni estis retransportitaj al meza Germanio, kie mia kara patrino vizitis min je mia naskiĝtago, vojaĝinte tagnokton en nehejtita trajnoj kaj kun mi ĝuante la nutran soldatan supon (la civiluloj jam ege malsatis tiutempe).

Oazo en la maldolĉaj eventoj de tiuj militaj jaroj.

Post forpermeso en marto mi partoprenis en aprilo ofensivon en norda Francio (apud La Bassée-kanalo). Poste batalsemajnoj en Pikardio, fine en Argon-arb-

aro, kie usonanoj faris min militkaptito por tuta jaro. Komence, apud Verduno, ni suferegis pro manko de barakoj, poste en usona kaptitejo en St.Pierredes-Corps ni loĝis ŝirmite, sed manĝis malmultege; fine, ekde februaro 1919, en St.Nazaire ni ĝuis trankvilan vivon kun abunda nutraĵo kaj kun muziko. Ĉar la usonaj oficiroj, kiuj estris la koncentrejon, konsistigis muzikteamon, liverante malavare la instrumentojn (ni havis du pianojn). Mi do ne bezonis partopreni kun la orkestro kaj prezentis programon en multaj vesperoj, kie la usonaj oficiroj ofte ĉeestis. Okazis ankaŭ teatroludado, kaj du teatraĵoj tie verkitaj de mi estis ludataj sur la moderne ekipita scenejo. Ni estis tiome tronutritaj, ke estis poste nefacile kutimiĝi al la malsatado en la hejmo, en Germanio. Tamen min invadis senfina ĝojego, kiam mi povis retrovi gepatrojn kaj gefratojn, tiel longe post militfino, kaj poste reenoficiĝi ĉe banko.

Ankaŭ mi povis dediĉi min denove regule al pianludo, ĉiusemajne frekventante kvalifikitan pianvirtuozon por leciono. Kaj tiutempe mi serioze entreprenis la tradukadon de l'Goethe-a "Faŭsto" en nian lingvon. Mi vetkuris en tiu laboro kun viena esperantisto, kolonelo Zwach (mi konatiĝis kun li en Prago, 1921) kaj trafis kiel unua la finon de la laboro, krome havis la ŝancon, ke la estraro de la ĵus fondita SAT favoris la eldonon de tiu universale konata klasika literaturaĵo.

La dua parto, pli longa ol la unua, malpli drameca sed tre lirika, estis tradukata de mi unuafaĵe en franca civilkoncentrejo, fine de 1939 ĝis 1940; ĝi forbrulis en aerbombado, 1943, kaj mi referis tiun malfacilan traduklaboron en 1946-47. La traduko ne estas publikigita - cetere temas pri dorna legaĵo pro la multaj mitologiaj nomoj kaj aludoj.

Dum la multjara militperiodo mi ne plu pensis pri infan-amikeco; ja tro longe mi estis forigita de la ordinara civila vivo ! kaj mi rekomencis kontakti kun infanoj nur sekve de mia partopreno en la politika lukto.

Reveninte el la militkaptiteco kiel socialdemokrato, mi simpatiis kun la maldekstra alo de la partio, kiu post disiĝo nomiĝis la Sendependa. De tie estis nur eta paŝo ĝis la komunista partio, kiu gajnis pli kaj pli da influo proporcie al la kresko de la dekstrularo, kiu minacis per sia diktaturo. Mi baldaŭ aliĝis la komunistan junularon. Mi ŝatus reliefigi ĉi tie, ke Lanti kaj "Sennacieca Revuo", la revoluciema gvidanto kaj la revolucieca organo de SAT, ludis rimarkindan rolon en tiu procezo de mia mensa evoluo. En Duseldorfo funkciis sufiĉe prosperanta Laborista Esperanto-Grupo; en ĝi manifestis sin pluraj komunistoj, kiuj bone posedis nian lingvon. Kiam en la jaro 1923 okazis en Duseldorfo strata manifestacio de la subtenantoj de Rejnlanda Respubliko (dependa de Francio, kiu havis dekstrulan registaron), kun junkomunistoj armitaj mi kontraŭmanifestaciis, embuske kuŝante sur la tiel nomata Napoleona monteto. Ne okazis en tiu ekscita tago batalo inter komunistoj kaj Rejnrespublikanoj, sed inter ĉi-lastaj kaj la polico, kun kiu ĉi-okaze la komunistoj aliancis vole-nevole.

o°o

Profundan ŝanĝon en mia vivo kaŭzis SAT kaj ĝia fondinto, kamarado Lanti.

Post la Kasela SAT-kongreso en 1923 Lanti vizitis min en Duseldorfo kaj sen bezono de granda persvado varbis min por la redaktado de "Sennaciulo", elironta kiel semajna gazeto ekde la 1-a de oktobro 1924, post sankcio de la Brusela kongreso de SAT.

Tiu akcepto de redaktora posteno necesigis, por la granda aflikto de miaj gepatroj, mian forloĝiĝon al Leipzig, kie troviĝis la administracio de SAT, sub gvido de Rikardo Lerchner. En tiu periodo mi ne nur redaktis la gazeton, sed ankaŭ helpis al Lerchner kaj lia plej aĝa filino en la ekspedo de "Sennaciulo".

Mi konfesas, ke mi ne sukcesis eviti doni favoron al komunist-tendencaj manuskriptoj, kiuj ofte ne havis grandan valoron pro manko de originaleco.

Se al k-do Lanti kaj al la pariza estraro fine ne plaĉis tiu unuflanka prezentado en la gazeto, aliflanke al Lerchner kaj Rihter, la Lejpcigaj komitatanoj, ne plaĉis, ke mi okupis min eksterofice pri junpionira grupo kiel monitoro. Jam en Duseldorf mi gvidis tian knabaran grupon kun politika stampo. Sed en Lejpcigo la kunvenoj, renkontiĝoj kaj ekskursoj estis pli oftaj.

Tiam oni, informite, en Parizo decidis maldungi min, nelonge post la Viena Kongreso de SAT (1925), kaj post kelkmonata senlaboreco mi dank'al kompartiaj esperantistoj lejpcigaj trovis oficon kiel librerevizoro ĉe kom.centro en Berlino. Estis do denove transloĝiĝo. Mi multe vojaĝis eksteren tra la tuta regno, sed trovis tamen tempon por okupi min denove pri junpioniroj. Tiuoj grupoj kutimis partopreni la tiutempe multnombrajn stratmanifestaciojn. La infanoj defilis kun la Ruĝfrontanoj - reflektan pri tiu periodo oni trovas en mia originala novelo "Diablidoj".

En 1926 mi partoprenis la Leningradan SAT-kongreson, sen respondeca posteno en la asocio. Mi foriris ŝipe al Stettin kun multaj aliaj kongresantoj, kaj ekde kiam ni atingis la Neva-enfluejon, multaj homoj ĉe la bordoj ĝoje salutis nin per mansvingado. Ni de tiam staris sub daŭraj emociaj impresoj, kaj estis vera kongreso de interfratiĝo. Postkongrese mi vizitis Moskvon kaj fine kun junulo komunista la urbon Ivanovo-Voznesensk, kie mi ĝuis familian vivon. K-do Nekrasov estis mia mentoro kaj gastiganto en Moskvo. Mi rehejmiĝis al Berlino aviadile, ĉar mi gajnis sufiĉe da mono ĉe la komunista firmo.

Denove grava ŝanĝo okazis, kiam mi, leginte helpokon en "Sennaciulo" pri redaktoro (pro tio ke Lanti suferis je la okuloj kaj la bulgaro Ivan Krestanof montriĝis nekompetenta por la rolo), anoncis min preta transpreni la redaktlaboron sub gvido de Lanti en Parizo; kaj ekde januaro 1928 mi enloĝiĝis en lia hejmo, kie mastrumis lia edzino, k-ino Limuzin. Mi restis tie ĝis 1933, kaj post unu jaro en subluo samkvartale mi ekloĝis ekde januaro 1934 en la 20-a urbkvartalo, kie jam troviĝis delonge la sidejo de

SAT.

La nova oficejo de SAT, unue luita, poste aĉetita, restis ĝis hodiaŭ la SAT-centro. Kiel vi scias, Lanti havis sufiĉe malfacilan karakteron kaj oftajn koler-eksplodojn. Tamen li konis sian malforton kaj ĉiam rapide kvietiĝis por juĝi trafe kaj juste. Lia riĉa spirito kondukis min al multe da meditado kaj observado, kaj mi neniam bedaŭris tiun lernotempon. Tre rapide mi nun komprenis la eraron sin dediĉi al politika partio, kiu ĵus eliminis, en Moskvo, siajn kapojn, ekzilis Trocki-n kaj instalas la stalinan diktatorecon.

Sekve, alveninte en Parizo, mi ne plu renovigis mian membrecon al la kompartio, kaj mi pli kaj pli intimiĝis kun la sennacieca pensmaniero kaj kun la rezonado de Lanti, kiu per sia "Manifesto al la Sennaciistoj" en 1930 metis la unuan ŝtonon al nova pensmaniero elpuŝanta la naciecajn sentojn kaj tradiciojn. Persone mi konstatis ankaŭ kontente, ke mi en Esperanta verkado alproprigis al mi stilon liberigitan de la nacilingva frazkonstruo (tro longaj frazoj kun tro multaj propozicioj).

Mi tamen ne tute fuĝis la komunistan medion; en la kvartalo, kie mi oficis por SAT, troviĝis komunista kooperativo ("La Bellevilloise"), kie dum multaj jaroj okazis Esperantaj kursoj kaj tie ĝis 1934 estis la oficiala sideja adreso de SAT. Tiu kooperativo inter aliaj branĉoj havis infan-zorgadon. La geknaboj ekskursis ĉiudimanĉe (estis ofte cent infanoj); krome la estraro organizis por ili festojn, muzik-ekzercadon, ludojn kaj multon alian.

Mi estis helpmonitoro, kaj mi ĝuis kun la infanoj tre belajn dimanĉojn en la ĉirkaŭaĵo de Parizo. Kelkaj knaboj fariĝis miaj plej bonaj amikoj, kaj ili frekventis mian hejmon; sed temis ne nur pri anoj de tiu kooperativa zorgejo. Kiuj el ili transvivis la duan mondmiliton, tiuj ankoraŭ hodiaŭ, kiel plenkreskuloj kaj patroj, konservas al mi sian amikecon. Tri pereis dum la milito (ili ĉiuj tri nomiĝis Marcelo), sed neniu el ili estis soldato.

Tiu kooperativo restis mia sola kontakto kun la komunista movado, ja sufiĉe impona en Francio; sed nenian senton de komuneco mi havis plu kun la gvid-

antoj kaj kun la principoj de la Moskvanoj. Tion mi nete esprimis en la antaŭparolo al mia dua originala verketo: "Juneca Ardo". Ĝi estis la rezulto de mia deziro priskribi belegan ferian aventuron en la tiama libertempejo de la Belvilaj geknaboj, je 45 kilometroj de Parizo. Tie mi pasigis kelkajn semajnfinojn en aŭgusto 1928, ankoraŭ ne posedante tre flue la francan lingvon.

Mi tranoktis en najbaraj vilaĝoj, kaj post likvido de tiu infankolonio en la sekvanta jaro mi daŭrigis viziti en kelkaj dimanĉoj la vilaĝon... fakte ĝis la hodiaŭa tago. Mi konas tie multajn familiojn, ĉar mi tie sen ajna politika fono promenigis la infanojn, somere kaj vintre, kaj la gepatroj estis tre kontentaj pri tio, ĉar ne ekzistis infansocietoj en tiu tamen sufiĉe granda vilaĝo (900 loĝantoj).

En la jaro 1937 mi verkis la rakonton "Vartejoj" pli ampleksa ol la du antaŭe nomitaj, sed ankaŭ pli problemeca; ne al ĉiuj legantoj plaĉis tiu verko, kiu aperis en 1938, do nelonge antaŭ la eksplodo de la dua mondmilito, pro la dubinda konduto de la centra figuro.

Pri mia SAT-oficula aktiveco atestas publike ĉefe la de mi redaktitaj jarkolektoj de "Sennaciulo" kaj la kelkajn jarojn monate aperantaj kajeroj de "Sennacieca Revuo" (ĝi fariĝis unu sola jarkajero post la milito).

En tiuj kolektoj oni povas prijuĝi la laboron, kiun mi plenumis dum jardekoj en la intereso de la SAT-movado. Oni konsideras malpli la pezan kaj temporan administran laboron, kiun mi devis preni sur min sekve de la likvido de la Lejpciga administrejo (en jaro 1933, jaro de la ekrego de Hitler en Germanio). Efektive mi devis, ekzemple, maŝinskribi la adres-etiketojn por 2000 abonantoj, ĉar tiutempe SAT ankoraŭ ne disponis pri adresmaŝino kiel hodiaŭ.

En aŭgusto 1939 okazis la 19-a kongreso de SAT en Kopenhago; ĝi estis la lasta antaŭ la Dua mondmilito. Mi rajtas skribi, ke en tiu kongreso mi atingis la kulminon de efikeco rilate paroladojn. Mi ne estas denaska oratoro. La ofico ĉe S.A.T. devigis min en

la ĉiujaraj kongresoj salutparoli nome de la Plenum-Komitato kaj ankaŭ paroli pli malpli libere prezentante la jarraporton al la kongresanoj.

Partoprenintoj en la Kopenhaga kongreso povos atesti, ke mi sen iu manuskripto parolis pli ol honron pri sennaciismo kaj SAT-tendencoj; krome mi en propaganda manifestacio en Popola Parko ĉe la sama kongreso parolis libere longan tempon (traduko okazis por la neesperantista publiko). Certe, kiam min devigis la ofico oratori postmilite, unuafoje en Torino, 1950, la vervo iom kvietiĝis.

Ĉiuokaze mi multe preferis kaj ankoraŭ preferas verki artikolojn por gazeto, ol paroladi dum kunvenoj kaj kongresoj. Cetere nia Lanti multe malŝatis oratori, dum lia plumo neniam perfidis lin, laŭ stilo kaj precizeco de pensado.

La terura milito eksplodis la 1-an de septembro 1939, kaj post tri tagoj mi perdis mian liberecon, pro tio ke mi neniam klopodis anstataŭigi unu naciecon per alia. Mi do restis en francaj koncentrejoj ekde tiu dato ĝis la invado de Francio fare de hitleraj trupoj, en majo 1940. El Normandio oni evakuis min ĝis Liburno (suda Francio), kaj tie "liberigis" min la germanaj venkintoj. Mi ne longe rajtis resti en mia hejmo pariza; oni rekondukis min kaj ĉiujn germanajn civilulojn (nefidindajn) en la originlandon, kaj en Duseldorfo mi esperis povi pasigi trankvile la militsekvon, deĵorante ĉe banko. Mi estis feliĉa en kunvivado kun mia patrino kaj fratino (la patro mortis en novembro 1939). Sed oni lasis min tiasata nur unu jaron. En aŭgusto 1941 mi estis "mobilizita" por civilservo en norda Francio (librotenisto ĉe konstrufirmo germana). Ankaŭ tie, en Kalezio, mi akiris tuj la amikecon de la infanaro - multaj idoj de ministoj - kaj la gepatroj vidis plezure, ke mi promenis ilin ĉiudimanche, ofte sufiĉe longajn distancojn. Tio, kaj certe ankaŭ la korespondado, kiun mi estis rekomencinta kun miaj parizaj antaŭmilitaj amikoj, kaŭzis mian suspektiĝon kaj fine arestiĝon.

Tio okazis la 28-an de februaro 1942, vespere, dum mi pretigis min je vespermanĝo kun la aliaj germanaj deĵorantoj de la firmo, post marŝo dukilometra tra la

la neĝo.

Kaj tiam mi estis travivonta la plej terurajn monatojn de mia vivo : unue du monatojn en malseka kaj glacie malvarma izolata ĉelo en malliberejo de Bethune, en majo antaŭ milittribunalo de Arraso kun kondamno post ŝajnigo de regula proceso je naŭmonata karcera puno (en kiuj estis inkluzivitaj la du monatoj de poresplora enfermo). En julio oni transportis min tra Bruselo al civila malliberejo en Sarbruko; mi tie faris pezan terfosistan laboron, sub bruleganta somera suno, spertis noktan aeratakon, enfermite en ĉelo duetaĝa, kaj fine mi pro nova pli rigora ordono de Hitler koncerne mia-kategoriojn, estis transportata al koncentrejo en norda Germanio, proksime de la nederlanda landlimo.

Tio estis la plej malhela periodo de mia vivo ! Vestite per lignoŝuoj ne kongruaj al la piedoj mi kun la aliaj viktimoj, preskaŭ ĉiuj ribeluloj kontraŭ la armea ordo, pikadis torfon en la ĉirkaŭaj marĉoj; batoj estis tiel ordinaraĵoj, ke mi apenaŭ registris ilin. Furunkoj aperis sur la tuta korpo. Ulceroj profundigis ĉe la maleolo, kie frotis la lignoŝuo.

La samsortanoj devis admoni min, por ke mi persistu kaj ne malesperu; malsaniĝo signifis kondamnon al pli malpli rapida morto. Ja la plej prema kaj sufoka elemento estis la atmosfero, kiu regas inter subhomoj, kies homecon oni sisteme fordetrus.

Lau la verdikto mi devus esti liberigita je la 7-a de decembro 1942. Ĉar nenio tiurilate anonciĝis, mi pasigis skribaĵon al la administrejo de la Laborkampejo (kiel oni nomis la famajn koncentrejojn hitlerajn), kaj post telefonado kun la juĝistoj en Arraso, kiuj konfirmis la finiĝon de mia puntempo, mi troviĝis en tre frua horo matene je la 9-a de decembro ĉe la stacidomo Papenburg, ankoraŭ protektita de du gardsoldatoj de la kampejo.

Kaj tiam venis trajno, kaj en agrable hejtita kupeo mi festis kun ĝojega koro la revenon en la normalan homan socion. Mi ne parolis al la kelkaj kunvojaĝantoj - estis kamparanoj - sed mi ĝuis tre profunde ilian apudeston. Estis ja la unuaj veraj homoj,

kiujn mi retrovis post longa elmondigo. Jes, ĝi estis la plej feliĉa tago de mia vivo, kaj posttagmeze, ja longe atendita de la patrino, mi retrovis mian hejmon, en stato nerekonebla pro la malsano, kiu mordis min. Post pluraj kuracist-vizitoj, eĉ ĉe haŭtspecialistoj, la ŝajna furunkozo montriĝis simpla skabio, kiu malboniĝis pro la gratado. Ja, laŭ bona konsilo irinta al hospitalo, tie mi bezonis nur lavi mian korpon sulfure dum tri tagoj por la kompleta resaniĝo de l'haŭto. La psika stato bezonis iom pli longan tempon por normaliĝi post ĉio trasuferita...

Mi reoficis en banko komence de 1943. En junio la granda nokta bombatako de usonanoj al Duseldorf detruis la gepatran domon, en kiu mi kreskis kiel infano kaj junulo kun miaj gefratoj. Ĝi komplete forbrulis pro la fosforpafaĵoj, kaj eĉ ne unu el la multaj portretoj tiel bele ole- aŭ paŝtel-pentritaj de mia patro estis savita. Ni savis apenaŭ nian propran vivon, transkurante la straton al la plej proksima kela ŝirmejo. Post malmultaj tagoj patrino kaj fratino fuĝis al Dreseno ĉe parencojn, kaj mi sola restis ĉe kuzina familio, kies domo ankoraŭ staris post la atako, kaj mi daŭre laboris en la banko ĝis mobiliza ordono vokis min al la armeo.

Ja tuj post liberiĝo el la koncentrejo la tieaj aŭtoritatoj estis komunikintaj mian nomon kaj adreson al la rekrutiga oficejo duseldorfa. Unu fojon mi eskapis la soldatiĝon, ĉar mia korpo montris ankoraŭ tre videble la markojn de la haŭt-inflamo, sed en decembro la militkuracisto juĝis min taŭga (fine de 1943 oni bezonis multajn virojn por anstataŭi la en Rusio kaj alie pereintajn). Fine de januaro 1944 mi enkaŝerniĝis en Vestfalia urbeto por sanitara servo (brankardisto). Tie mi eklernis skii sur ebena tereno en la abunda neĝo de l'februara monato, vide al praktikado ĉe la rusia batalfronto. Fine de aprilo oni transportis nin al Baltlando (Estonio). Mi konfesas, ke mi pasigis ses tre kvietajn monatojn - la tutan someron ĝis aŭtuna komenco.

Mi deĵoris (pro mia aĝo : 47 jaroj) en postfronta

hospitalo, kaj dum multaj monatoj ni flegis nur kelkajn malsanulojn, neniujn vunditojn. Mi lernetis la estonan lingvon, tiel ke mi povis teni simplan konversacion, precipe kun infanoj; ĉar ĉi-lastaj baldaŭ ekkonis mian amikan inklinon por ili, ligiĝis multaj amikecaj ligoj. Nia deĵoro ne ĉiam estis facila, sed ofte estis ja longaj paŭzoj kun efektiva ripozo. Ni vagadis ĝis la Pejpuslagego. Pri la rapida alproksimiĝo de la rusaj armeoj ni eksciis nur, kiam oni evakuis nin el la orienta regiono de Estonio kaj instalis nin en Nõmme, antaŭurbo de Tallinn (Reval), kie ni ĝisatendis la venkantan trupon. Sed ne senlabore... ĉar en tiu periodo alvenis ĉiutage vunditoj, el kiuj multaj jam dum la transporto estis mortintaj, ne plu bezonante prizorgon.

La nokton antaŭ la okupo de Tallinn fare de la rusaj trupoj, 21-an de septembro 1944, ni estis surŝipigataj, dense kunpremitaj miloj, kaj bonŝance ni eskapis la torpedojn, kiuj faris milojn da viktimoj dum tiuj tagoj sur la Balta maro.

En Liepaja (Libau), kie ni atendis la sekvojn dum tri tagoj, mi ludis kun ĉarma kvinjarulo, filo de la pedelo de la konstruaĵo, kie ni estis instalitaj. Poste en Notainen, Litovio, denove amikiĝo kun knaboj; forrifuĝo alarma, ĉar oni signalis la rusojn je dek kvin kilometroj da distanco. Fine alveno en Memelo (nuna Klaipeda) jam bombardata de aviadiloj kaj artilerio. Survoje ni estis perdintaj la tutan hospitalan materialon ŝarĝitan sur la veturiloj, kune kun ĉi-lastaj. El la de rusaj soldatoj ĉirkaŭbarita urbo ni eskapis mirakle sur ŝipeto al la terlango, kiu ebligis al ni sekvi laŭlonge de la marbordo tra la sablo, kaj fine kolektiĝi en forlasita ban-urbeto. De tie ŝipe ni atingis tra kanaloj Kenigsbergon (nun : Kaliningrad). De tie trajno kondukis nin fine de oktobro preter Berlino al Vestfalia urbeto, kie ni ripozadis ĝis mezo de decembro.

Tie, en Werther, mi havis multe da kontaktoj kun la infanaro; sola deviga servo estis kelkfoje hakado de ligno por la fornoj. Mi do promenis kun la geknaboj, kurludis kun ili, kaj en unu familio mi ĝuis

pianludon, esperante pasigi en tiu medio la jarfinajn festojn. Sed tio ne eblis ! Oni vokis nin denove al postfronta hospitala laboro...

Ĉi-okaze mi faru jenan rimarkon : Ne nur en la knaba pantaloneto, kiu proksimigis min al la infanoj, mi ĝuis la simpatio de la etuloj, sed eĉ kiam mi estis grize vestita soldato (pri kio miris multaj plenkreskuloj, kiuj faris tiun konstaton, kaj ili konjektis, ke tio okazas pro la foresto de 1' patroj en militejo; sed tio ne ĉiam estis la kazo, kaj certe ĝi ne estis la vera kaŭzo de tiu tuja amikiĝo kun la geknaboj).

Pezega estis la deĵoro en komenco de januaro proksime de la belga landlimo (lasta ofensivo de la germana armeo). Poste ni retiriĝis tra Eĵfelo pli norde; ni instaligiĝis en Bad Godesberg ĝis la alveno de la usonanoj. Sur la dekstra flanko de la Rejno ni haltis en diversaj urbetoj, kaj fine, meze de aprilo, kapitulacis estante ĉirkaŭpremitaj de ĉiuj flankoj, en la suda Rurregiono. Jen denove militkaptito loĝanta kiel besto plenaere, sen ŝirmejo, en memŝovelitaj tertruoj. Post dek unu semajnoj mi "rehejmiĝis": ne plu estis familianoj tie, patrino kaj fratino restadis ankoraŭ apud Dresdeno, sub rusa okupado. Nur iom post iom organiziĝis la retransportado de tiuj rifuĝintoj al la okcidentaj zonoj de Germanio. Mi enloĝiĝis ĉe la familio Tarnow, kie la patro, tre konata kaj estimata esperantisto, estis mortinta jaron antaŭe. Mi okupis lian laborĉambron.

Ĉe banko mi ne plu trovis dungigon; mi do instruis private la francan lingvon kaj pianludon. Mi havis sufiĉe da gelemantoj por vivteni min. La pariza SAT-gvidantaro klopodis revenigi min al Francio por ke mi reakceptu la postenon de sekretario kaj redaktoro ĉe SAT. Tiuj klopodoj montriĝis longe vanaj, kaj kiam mi sukcesis reveni, en aŭgusto 1948, mallonge post la Amsterdama SAT-kongreso, mi estis unu el la maloftaj germannacianoj, kiuj ricevis la permeson de restado en Francio.

Okaze de la unua postmilita SAT-kongreso en Arhuzo (1947) la permeso de la danaj aŭtoritatoj pri mia vojaĝo alvenis unu semajnon tro malfrue. Tamen tiuokaze

mi povis rekontakti la gekamaradojn parizajn kaj alilandajn, unue ĉe la stacidomo en Duseldorfo, kie trapasis trajno el Parizo, due en Bremeno kaj Hamburgo ĉe la ŝoseo, kie travojaĝis autobusaj karavanoj kun kongresanoj. Kun ĝojo mi akceptis tiam manĝopakaĵojn, ĉar mizera estis la nutrado en tiuj jaroj en Germanio; ankaŭ mi ricevis pro la helpkampanjo de k-do Bonesper el Novjorko de tempo al tempo nutropakon.

En la postmilitaj jaroj en Duseldorfo mi verkis esperante nur kelkajn neampleksajn novelojn, eldonitajn ĉe S.A.T. antaŭ nelonge; en unu el ili estas prezentata kaj pridiskutata la doktrino de Lanti por la unua fojo sub formo de rakonto. Dume en Parizo kuŝis kaj kuŝas ankoraŭ manuskripto de pli ampleksa romano "Petro la Brunmontano".

Da inter la du militoj eldonitaj verkoj mi krome devas menciigi "Petro"n, lernolibro laŭ duonrekta metodo, tute en Esperanto, kiu vidis 8 eldonojn, kaj "Unua Legolibro"n, kiu vidis du eldonojn. Ankaŭ mi, laŭ ricevo de manuskriptoj post voko en la tiama "Sennacieca Revuo" (1923), kompilis "Proletaria Kantaro"n (kun muziknotoj), kiu entenis 74 kantojn ĉefe revoluciajn.

En la postmilita Parizo mi ja ne retrovis mian ĉambron el la jaroj 1934-1939, kaj mi longe devis barakti, loĝante ĉe kelkaj SAT-kamaradoj, ĝis mi trovis unuan pli daŭran loĝejon en strato Tolbiac (dank'al k-do Meijer). Poste mi subluis en la Latina kvartalo por ok jaroj, disponante de 1954 denove pri propra piano. Vi povis konstati, ke de tiam mi pianludis publike en multaj SAT-kongresoj.

Mi ankaŭ pianludis ofte la vesperojn, dum kiuj mi ĉeestis ĉe la montmartra kabaredo "La Tri Koboldoj", vivigita plurajn jarojn de Remondo Schwartz, la fame konata simpatia aŭtoro de gajhumoraj libroj (li mortis en 1973).

Montriĝis tre ampleksa kaj peza la administra laboro ĉe la revigliginta SAT. Ofte apenaŭ sufiĉis la tempo por orde prizorgi la redaktadon, kiu koncernis, ekde 1952, ankaŭ la renaskiĝintan "Sennacieca Revuo"n

kies 60-paĝaj jarrajeroj trovis bonakcepton ĉe multaj seriozaj legantoj.

Dum la someraj monatoj estis iom malpli laborŝarĝitaj, tamen tuj post la jara kongreso de SAT, kie mi prezentis la komentojn al la raporto pri la ĝenerala agado de la Plenum-Komitato, mi devis redakti la kongresprotokolon laŭ mia stenografajo.

Pro la kongresoj mi devige fariĝis oratoro, ne nur preleganto, kio ja postulas malpli da koncentrigo kaj da parol-efikeco. Mi, la tuja psika kontakto kun la ĉeestantaro el kamaradoj faciligis al mi tiun taskon. Post la unuaj frazoj mi ne plu sentis nerv-econ.

Estu tamen dirite, ke mi bone eltenis tra ĉiuj jaroj tiun laborŝarĝon ĉe la SAT-sidejo, neglektante neniujn erojn de la administracia kaj redakta tasko. Mi ŝuldas tion al mia fortika organismo, kiu protektis kontraŭ gravaj malsanoj.

Mi restis fraŭlo, kiu faktoro ankaŭ ebligis al mi la grandegan laboron postulatan ĉe la sidejo de SAT. Needziĝo signifas rezignon je propra idaro. Sed infanoj plej diversaj, egale el kiu raso, sed ĉefe de laboristaj gepatroj, kompensis larĝe tiun mankon. Vivkunulinon mi neniam serĉis; la plej amata ina estaĵo en mia vivo restis mia patrino.

Post forlaso de la subluita ĉambro en la Latina kvartalo, ĉefe pro la tro altiĝantaj kostoj, ne proporciaj al mia tiama enspezo, mi loĝis jaron ĉe k-do B.G.D., en Pantin, kaj fine en ruldomo, tute fiksi ta kaj ne rulkapabla, jam pli ol jardekon en la ĉirkaŭurbo, en Villepinte.

Kiel redaktoro de "Sennaciulo" mi ja sufiĉe ofte trovis necesa verki bazajn artikolojn. Ili ĉiuj koncernas la ideologion de S.A.T., kaj la filozofio de Lanti reflektiĝas en multaj el ili. Ofte mi elektis kiel elirpunkton por verkaĵo la universon por fiksi en ĝi la rolon de la terloĝantaro kaj difini ĝian socian pozicion.

Kompreneble en ĉiuj miaj artikoloj la maljusteco de la nuna homsocio kun ĝia hierarkio kaj ĝia ekspluatsistemo estas demonstrata kaj vipata.

Lanti, raciista pensulo, ne ofte traktis la art-

kreadon, mem ne havante senton por poezio, muziko kaj aliaj artoj. Mi persone ofte ligis kun la pure racia strebado al sennacieco la harmonion estetikan de la naturo kaj de la artoj, ĉar mi ekkonas en tio pli superan ŝtupon atingeblan de la homaro - ŝtupo atingebla ne nur por kelkaj privilegiuloj, kiel hodiaŭ grandparte - sed atingebla de ĉiuj en libera socio.

Redaktante la kajerojn de "Sennacieca Revuo" (unu fojon jare), mi ĉiam verkis la "Enkondukon" al la enhavo, mallonge skizante ĉiujn verkaĵojn ententajn.

Servante mi povas diri, ke mi estis la persono, kiu partoprenis la plej multajn kongresojn de SAT, nome 39 el 46 okazintaj ĝis 1973. En "Sennaciulo" kaj en "Sennacieca Revuo" mi aperigis de tempo al tempo propran artikolon; tiuj kontribuoj ĝenerale rilatas al la Lantia ideologio, al kiu mi preskaŭ denaske inklinas, sed kiu iam-tiam estis viŝita per la momentaj politikaj fluoj kaj eventoj. Konŝcia sennaciisto mi ja fariĝis pro la spertoj de la vivo, precipe la amaraj travivaĵoj de du mondskalaĵ militoj. Kaj se mi esprimus tutkoran deziron mian, tio estus ke mi povu injekti tiun spirito-staton al la infanoj kaj pli junaj homoj, sur kiujn efike influi mi havas okazon.

N. Bartelmes



Dek artikoloj

- * Praktiki Esperanton signifas kontraŭbatali faŝismon ! (Sennaciulo, 25. januaro 1934) ... 27
- * Kaŭzoj k efikoj de modesta broŝuro (Sennaciulo, 25. majo 1934) ... 29
- * Ni havu ĉiam antaŭ la okuloj la celon atingotan (Sennaciulo, 25. marto 1936) ... 33
- * Ni celu Sennaciecon en agoj k pensoj (Sennaciulo, 25. marto 1937) ... 36
- * La Instruoj de la Septembraj Okazaĵoj (Sennaciulo, 25. novembro 1938)... 39
- * Raci' nin vokas (Sennaciulo, marto 1964) ... 42
- * Kion ni rajtas postuli (Sennaciulo, februaro 1965) ... 46
- * 1. Majo 1945 - 1. Majo 1965 (Sennaciulo, majo 1965) ... 49
- * Sennaciecaj aspektoj (Sennaciulo, novembro 1965) ... 52
- * Kosmaj fajreroj (Sennaciulo, januaro 1969) ... 55



Notoj

Mallongigoj :

I.P.E. (= Internacio de la Proleta Esperantistaro). Fondita en 1932 fare de esperantistaj membroj de komunistaj partioj, tiu asocio malaperis antaŭ la dua mondmilito.

I.S.E. (= Internacio de Socialistaj Esperantistoj). Fondita en 1933 fare de E-membroj de socialistaj partioj, tiu asocio ne postvivis la duan mondmiliton.

Krome, la leganto bonvolu noti, ke sekve de posta modifo, la frazero el la SAT-statuto citita sur p. 35 (lasta linio) tekstas nun jene :

"SAT, ne estante parti-politika..."
(anstataŭ : "ne estante politika")

PRAKTIKI ESPERANTON

SIGNIFAS

KONTRAŬBATALI FAŝISMON!

Neniu povas nei, ke la tendencoj, kiuj en la lastaj jaroj gajnis plej multe je influo en la mondo, estas la naciismo kiel plej reliefa formo, la faŝismo. Ni ne volas esplori ĉi tie pri la kaŭzoj de tiu fenomeno, sed deziras nur, konstatante la fakton, altiri la atenton de la K-doĵ al la evidentaj reafikoj de tiu evoluo sur la esperantistan movadon.

En "neŭtrala" gazeto esperantista ni legis antaŭ nelonge noton pri mokversaĵo, aperinta en unu el la plej konataj satiraj gazetoj en Germanio (hodiaŭ kompreneble naciŝocialista, sed ankaŭ antaŭe ĉiam kontraŭrespublika). En tiu versaĵo ĝoĵo esprimiĝis pri la "regreso" en la esperantista kampo, la malfortiĝo de la propagando por mondlingvo. Kvankam ĉe tiuj sinjoroj la deziro estas la patro de l'ideo, tiu ĝoĵesprimo estas iel instrua. Ĝi montras, ke la naciistoj tre klare konscias pri la rolo de mondlingvo kiel esperanto, kiel ili klarvidas pri la rilatoj inter naciismo kiel lingvo (pri kiuj eĉ multaj esperantistoj havas sufiĉe nebulan komprenon). La regantoj, kiuj bazas sian juĝon sur la naciaj antaŭjuĝoj, scias bone, ke kontraŭbatalante esperanton, ili trafas la spiriton de sennacieca emancipiĝemo, kiu povus manifestiĝi ĉe la popolaj amasoj.

Estas tute klare por ĉiu klaskonscia laboristo, ke prepariĝas teruraj batalegoj, ke necesos granda kiel longdaŭra luktado inter la kreskeganta faŝismo kiel la fortoj de la kultura kiel socia progreso. Kaj estas same klare, ke en tiu batalego ambaŭflanke uziĝos la plej modernaj kiel plej efikaj bataliloj. Sed kiel batalilo por la spirita formado de la proletaro kontraŭ la naciisma bacilo estus pli taŭga ol esperanto?

Mi aŭdas ankoraŭ el la IPE-tendaro la riproĉon, kiel kiun oni eterne faradis al Lanti kiel al tiuj, kiuj de-

fendas plej konscie la SAT-ideojn; ke oni prezentas esperanton kiel universalan kuracilon k fortiras tiel batalantojn de ilia vera batalloko (en partio k sindikato). Neniam tiu aserto estis pruvita k nenio estas pli malvera ol tio. Praktiki esperanton ja signifas por laborista aktivulo esti ekipita en la batalo per la plej moderna ekipaĵaro. Kaj certe tia estas la ilo, kiu havas la povon funde transformi la spiriton de homoj, kiuj devas vivi en la malvasta kadro de naciaj limoj k tie enspiras seninterrompe la haladzojn de la nacia atmosfero.

Esti SAT-ano - k pri tio mi volus insisti - ne signifas perdi la intereson pri sindikataj aŭ partiaj aferoj. Ĝuste kiel aktivulo en politikaj aŭ ekonomiaj grupiĝoj la SAT-ano havas konsiderindajn avantaĝojn antaŭ aliaj, pro tio ke li komprenas pli profunde k laŭsperte la tutmondajn problemojn. Li perceptas, havante pli vastan horizonton, pli frue ol aliaj la sin anoncantajn favorajn aŭ malfavorajn situaciojn.

Oni devas funde kompreni, ke inter la mondpolitiko kun ĝiaj naciaj k sociaj bataloj k nia esperanta movado ludiĝas la ludo de kaŭzo k efiko. Ni esperantistoj ne vivas izolite sur iu verda insulo en oceano, kien la ventegoj ne penetras k la ondoj mole plaŭdetas kontraŭ la bordojn. La skuegoj de l'mondpolitikaj okazaĵoj, sur nacia k socia kampo, skuas nian esperantan aferon kun uragana forto, tiel ke la alarmsonorilegoj sonoregas tage k nokte k la problemoj tute nete stariĝas antaŭ ni.

K-doĵ ! Vi vidas stumpiĝantaj iam florantajn arbojn, kiujn ornamis belega verda foliaro; la fulmo de diktatora glavo frapis ilin. Sur esperanto-arboj ankaŭ sekiĝis folioj, ekputris fruktoj. Kaj tamen la esperanta stelo portiĝas en la butontraŭoj, k tamen oni propagandas tie k alie; k se en unu loko renversiĝas la arbegoj, ekkreskas aliloke novaj, junaj. Esperanto vivas ! SAT vivas !

Kaj ni zorgos, ke la malbelega rikanado el la buŝo de la satira fuŝpoeto en "Kladeradaĉ" rigidiĝu sur liaj lipoj ! Tie, kie restis eblo por ni labori, varbi k agiti, ni montru, ke ni ne laciĝis.

K A Ŭ Z O J K E F I K O J

D E M O D E S T A B R O Ŝ U R O

La 2-an de junio estos pasintaj 47 jaroj, de kiam d-ro Zamenhof sub la pseŭdonimo Esperanto aperigis la unuan, tre simplan k neampleksan gramatikon de esperanto. Post longaj klopodoj, por trovi eldoniston. Zamenhof ja vivis en la cara Rusio, en la Rusio aŭtokrata, jam tiutempe aktive subminita de liberecamaĵ elementoj. Ĉu nova subminaĵo minacis en la formo de tiu ĉi eta, modestaspekta broŝuro, kies aŭtoro kaŝis sin sub pseŭdonimo k kiu adresis sin kun tiom strangaspekta lingvo al ruslingvanoj ?

- Utopiisto ! diris unuj. - Danĝera internaciisto, emis konkludi aliaj. Sed estis ankaŭ kelkaj personoj, kiuj aĉetis tiun ĉi broŝuron, k kiuj, ial, interigis tiom pri ĝi, ke ili trastudis la tutan verketon k kiuj post tiu studado komunikis siajn nomon k adreson al la iniciatinto, d-ro Zamenhof. La utopiisto de l'unuj, la danĝera internaciisto de l'aliaj ekhavis disĉiplojn !

Kaj la disĉipla rondo baldaŭ plivastiĝis, infektante homojn de aliaj landoj; ĝi fariĝis pli k pli granda... Kaj venis momento, kiam la majstro, tiu studema homo, tiu ĉambra scienculo, ĝis tiam modeste kaŝita en sia kabineto, surpaŝis la tribunon : Bulonjo-ĉe-Marzo, en la jaro 1905. Kaj tio ripetigis regule ĉiujare, okfoje en la sekvo... ne pro oratoremo de la ĉambra scienculo, nek pro avido rikolti gloron k aplaudon. Ĝi estis la konscio pri devo, kiu instigis lin kongresparoladi, kiel ĝi estis la devo-konscio, kiu instigis lin traduki el multaj lingvoj klasikajn verkojn, por ĝisfunde elprovi la solidon k uzeblon de sia kreaĵo. Kaj per tiuj paroladoj ni ankaŭ pli profunde ekkonas, kia estis la baza instigilo, kiu verkigis al Zamenhof la mondlingvon.

Esperantismo.

Kiujn temojn do elektis d-ro Zamenhof por siaj paroladoj ĉe kongresoj ? Ne estas malfacile imagi, ke

li spirite vidis antaŭ si la aŭskultontaron, konsistantan el anoj de dekoj da diversaj nacioj. Al tiuj ĉi homoj, kiuj trovis sufiĉe da entuziasmo k fervoro, por dediĉi al lia lingva kreaĵo tempon, energion k monon, kiuj kredis al la vivanteco de esperanto, kiuj komprenis la universalan lingvon k povis esprimi sin per ĝi, li povis direkti nur vortojn komune akcepteblajn k komprenotajn ne nur sone sed ankaŭ sence laŭ sama maniero. Kaj li tiel konfesis sian kredon, sian esperon, ke la lingvo servos por interfratigi la popolojn k la rasojn k starigi regnon de mondopaco. Ĉi tiuj ideoj venantaj el granda koro, estis la profunda instigilo de Zamenhof por "iniciati" la lingvon vivigotan. Kaj sendube sen tiu ideo homoj ne estus oferintaj tiom multe, por ellerni la lingvon k poste renkontigi ie ajn en la mondo kun samideanoj, kun la celo vivigi la artefaritajn.

Estus ja maljuste, se ni, kiuj uzas esperanton kiel ilon en la libera batalo de la proleta klaso, volus ignori tiun fakton, ke la movado ekiris k ekkreskis, puŝate de ideo ligita kun la lingvo, ideo enkorpiĝinta en la movado k entenata en la vorto "esperantismo".

Kiam la laboristaj esperantistoj komencis apartiĝi el la komuna ujo, kiu mikse kungluis homojn el ĉiuj tavoloj k klasoj de la socio, la movado jam akiris ion gravon k atentindan disvastiĝon en ĉiuj landoj de la terglobo. La lab. esperantistoj faris tiun apartiĝon plenkonscie, por servi esperanton al la klasaj interesoj de la tutmonda proletaro. Sed ili tial havis neniajn motivojn, por riproĉi al la aŭtoro de esp-o lian naiv-animan kredon pri homara interklasa paco sen ŝanĝo de la tuta socia strukturo. Ĉar, kiel ni vidis, sen tiu kredo esp-o verŝajne neniam estus kreita, k sen tiu kredo ĝiaj unuaj adeptoj ne estus havintaj la impulson por vivigi ĝin.

Kelkaj seniluziigoj.

Ĉu Zamenhof konsciis pri la interna forto viviganta lian kreaĵon, kiam li ektransdonis ĝin al la publiko en la formo de broŝuro? Certe jes, sed - pli per intuicio ol per rezonado. Neniu inventanto ŝuldas

sian eltrovon al pure racia laboro; la intuicio ĉiam ludas gravan rolon.

Se Marks estis tro optimista rilate plenumigon de la socia transformo en periodo tre proksima, Zamenhof certe havis troan optimismon rilate la finvenkon de esperanto. Sed ĉu tio signifas, ke li estus rezigninta je sia elpaŝo de la 2. junio 1887, se li estus antaŭvidinta, ke post duona jarcento ankoraŭ stagnas la afero? Mi estas konvinkita, ke ne. Jarcentoj ne ludas rolon en la fluo de l'historio; jarmilojn bezonas travivi la homaro, por zigzage antaŭenmarŝi kun refaloj oftaj k subitaj.

Ni travivas en nia epoko tute evidentan regreson rilate la spiritan k kulturajn kampon de batalo. Mi ne povas konsenti pri tio, rigardi kiel kompenzaĵon la akirojn de l'tekniko (aviado, maŝinaro, ktp.). Precipe ĉe la vido, ke tiuj akiroj servas pli al detruo ol al konstruo. Esperanto, esprimo de la teknika periodo, signifas per si mem ankoraŭ nenian spiritan k kulturajn pluson, sed ĝi povas formi unu el la stilzoparoj por kultura progreso, kiun lastan mi povas imagi nur sennacieca.

La seniluziigoj rilate la rapidan ritmon de l' progreso de esp-o estas duspecaj; ili rilatas a) la homojn kiel individuojn, k b) la homaron kiel tuton.

Ni observas lernantojn en niaj kursoj, kiuj komence montras tre bonan lernvolon k komprenemon, sed tamen en iu momento forlasas la kursojn k absolute ne plu pensas pri esperanto, aŭ - se ili pensas pri ĝi, kun ia malamikeco, kiu igas ilin ofte veraj kontraŭuloj k malpropagandistoj de nia ideo k movado. Ni vidas ankaŭ finlernantojn, kiuj praktikas pli malpli grandskale esp-on dum pluraj jaroj. Kaj tiam venas ankaŭ momento, kiam ili naŭziĝas k turnas la dorson al la pioniroj de la movado, k oni ne plu sukcesas skui ilin al nova envicigo en la esperantista armeo. La registro de SAT, ekde la fondiĝo ĝis hodiaŭ, kun siaj multaj ŝanĝoj, ekziĝoj, aliĝoj, re-ekziĝoj, re-aliĝoj, ktp, atestas frapante pri la dirito. Persistemo! Ĝin ne atendu de multaj! Vanta iluzio.

Oni emas riproĉi k respondecigi kursgvidantojn, estrojn de grupoj k asocioj pro la perdoj de membroj

aŭ lernantoj. Tio estas facila maniero, sed ofte maljusta. Kiam en la K-doĵ la konvinko pri la neceso k grava signifo de nia movado ne estas sufiĉe disvolvita, ĉia predikado estas vana. Do, ĵen elŝlernintoj, kiuj grupiĝas kun la plej teruraj kontraŭuloj : la indiferentuloj, la apatiuloj, tiuj, sur kiujn superrege efikas rilate nian aferon la leĝo de l' inerto.

Malfacila pensosporto.

Mi rezignas laŭvorte citi, kion skribis antaŭ kelkaj semajnoj al ni aktiva esp. instruanto en Nederlando. La esenco de liaj diroj estas, ke eĉ en tiu centro de lab. esperantista aktiveco, kia estas Nederlando, k kie ĉiuj LEA-anoj ricevas "S-ulo"n, nur malmultaj kapablas k provas vere tralegi la gazeton k ĝui ĝian enhavon, utiligante ĝin por si mem k por sia medio. Ankaŭ el aliaj landoj ni jam aŭdis similajn dirojn. Esperanto estas malfacila pensosporto; oni bezonas grandan volon por finakiri ĝin; pri tio devus konscii ĉiuj Gek-doĵ k ili ne devus malesperi ĉe la unuaj malsukcesoj. Neniu el ni povas aserti, ke li tuj dekomence tralegis senpene esperantajn librojn k gazetojn. Sed la plezuro iom post iom akiri tiun kapablon estis certe grandega por ĉiu fidela adepto de la zamenhofa lingvo !

Ne estas laboristoj speciale dotitaj k pli lernkapablaj, kiuj atingis perfektan lingvokonon, sed estas tiuj, kiuj persistis kun firma decideco. Estas tiuj, kiuj arde deziris pcedi la lingvon, ĉar ili estas konvinkitaj pri ĝia granda valoro por la laborista klaso.

Temas pri batalilo !

Sed ĉio tio ne klarigas ĉion. La problemo koncerne la tutan homaran evoluon. La individuoj lernantaj esp-on, restus sendube daŭre interesitaj k aktivaj por nia afero, se nia epoko sekvus rektlinie la vojon, kiu bezonigas esperanton, t.e. la vojo al progreso k kultura sociordo.

Sed tiel ne estas; la naciismo, la faŝismo, la militismo estas pligrandigantaj siajn influon k for-

ton, k ili sentigas sian sufokan premon sur nian esperantan movadon. Tio komprenigas, kial restas nur la plej konvinkitaj, la plej firmaj en niaj vicoj...

Kaj tial nia afero vere staras sur multe pli vasta bazo ol multaj pensas. Ĝi staras en la unua vico ĉe la fronto de la granda batalo kontraŭ la mondreakcio : la neekzisto de nia movado signifus realan malfortigon de la batalfronto kontraŭ faŝismo k ŝovinismo. Havante esperanton, ni pli efike, pli trafe kontraŭbatalas la malbelegan hidron; havante esperanton, ni estas pli bone ekipitaj en la batalo.

Tion devus ĉiuj Gek-doj bone kompreni; tion devus kompreni ankaŭ la lernantoj de nia lingvo, ĉar tiam ili ne facilanime forlasus la studadon ĉe la unuaj malfaciloj renkontitaj; tion devus kompreni ĉiuj abonantoj al niaj gazetoj, tiam ili penus legadi ilin trae k ĝisfunde; tion devus kompreni ĉiuj membroj de nia organizo, tiam ili aktiviguŝu, ĉiu laŭ sia povo k ĉe sia frontoparto.

Komprenante, ke mondlingvo estas vere efikplena batalilo por la proletaro, ni kun dankemo memoras je la 2-a de junio pri la publikigo - antaŭ 47 jaroj - de tiu modesta broŝuro, kiu enhavis la unuan gramatikon de esperanto, k pri ĝia same modesta kiel genia aŭtoro.

N.B.

NI HAVU ĈIAM ANTAŬ LA

OKULOJ LA CELON ATINGOTAN

Dum la pasintaj jaroj, nigre stampitaj per gravaj malvenkoj por la socialista laboristaro tutmonda, multaj leteroj k artikoletoj pasis tra niaj manoj, en kiuj SAT-anoj aŭ simplaj legantoj de niaj gazetoj esprimis sian angorsenton, sian ĉagreniĝon, sian afliktiĝon ĉe la ekvido, kiel eĉ esperantistoj ne povas fosi trankvile k persiste sian sulkon, sed kiel ili, imitante la manierojn enkondukiĝintajn en la

ĝenerala laborista movado, ĵetiĝas en la kirlaĵon de malpacigoj k skismoj, kun iliaj lavangoj da insid-atakoj, insultoj k kalumnioj.

Antaŭ mi kuŝas unu el tiuj skribaĵoj, kiun ni ricevis en aŭgusto 1933 de SAT-ano 17.146. Ĝi siatempe ne povis aperi en "S-ulo", kiel multaj similaj, ĉu pro spacomanko, ĉu pro tio, ke ni opiniis, ke tiaj atestoj simple konstatas k konfirmas faktojn, ne alportante novan ideon aŭ solvon al la problemo. Tamen, post distanco de ĉu jaroj kaj duono, ŝajnas al ni utile aperi grandan parton el tiu skribaĵo, por tiri konkludojn en la aktuala stato de l'movado. Ni rimarkigu nur, ke en la momento, kiam la K-do prenis sian plumon, estis ĵus okazinta dua skismo, nome la stariĝo de ISE en Vieno.

Konstatinte, ke "anstataŭ unue venki, la laborista movado dispartiĝis k (kio estas pli grava) la partoj kontraŭbatalis unu la alian, profite al niaj kontraŭuloj", K-do 17.146 daŭrigas: "En la esperantista movado ŝajne la historio iras la saman vojon... Ĉu neniam ĝi iĝos pli saĝaj? Ĉu la ekzemploj ne estas okulfrapaj por ni? Ĝam disiĝis niaj komunistaj Gek-doĵ. Ĝen denove branĉo estas falonta, aŭ pli bone, radiko, kiu devus alporti vivigajn sukcojn, estas rompiĝonta. ISE estas stariĝonta. Ĉu ni denove travivos tian hontigan komedion kiel antaŭe? Antaŭ mi kuŝas iu Internaciisto el la komenco. Ĝi volas havi nenion komunan plu kun ni, kun SAT. Sed mi entute kalkulas 68-foje la trilateran SAT k sennombrafoje la nomon "Lanti" en ĝi. Ĉu tio prosperigas la propagandon por la esp. movado, por kiu multaj el ni oferas tiom da peno, da mono, da tempo, kelkfoje tri aŭ kvar vesperojn semajne? Gek-doĵ, rekonsciiĝu! Ni pruvu, ke esperantistoj ne sencerbe imitas la landajn organizojn, sed ke ili akiris pere de esperanto pli da prudento."

Nu, diros iuj K-doĵ: Tio estis antaŭ du jaroj kaj duono. Sed hodiaŭ la spiritostato k la situacio tute ŝanĝiĝis. Montriĝas forta emo al rekuniĝo de l'lab. esp-istaj fortoj.

Ĉu vere? Ĉu oni hodiaŭ pli fideme, pli amike, pli ŝate interrilatas? Ĉu tiuj ekzemple, kiuj forlasis SAT, ĉar ili ne plu sentis sin hejme en nia organizo,

hodiaŭ volas akcepti ĝian larĝspiritan Statuton, aŭ eĉ nur konsenti al ĝi vivrajton ? Por al tio respondi, ni nur bezonas preni en manon tute freŝdatan numeron de "Proleta Esperantisto", organo de franca IPE-sekcio (januaro 1936). Tie la iama SAT-ano Bubu (Boubou), kiu ĝis la skismo estis tute konsentinta kun la gvidprincipoj de SAT k akceptinta ĝian statuton, kun plej granda malestimo al la 1.400 individaŭj k konsciaj membroj de SAT demandas, kiom valoras tiu manpleno kompare kun la 25.000 (jes, dudek kvin mil!) prolet-esperantistoj en la tuta mondo.

Pri la fantazia cifero ni eĉ ne kverelu ĉi tie; kredeble ĉiu, kiu iam k ie komencis lerni esperanton en laborista medio, estas enkalkulita en ĝi; supozeble la nombro entenas ankaŭ nurajn simpatiantojn, kiuj foje prononcis favoran vorton pri nia afero. Sed ni faru kontraŭdemandon al Bubu : kial do li k liaj amikoj klopodas tiom fervore pri la memelektita sorto de 1' 1.400 SAT-anoj, se restas al li tiu vasta agadkampo, nome 23.600 prolet-esperantistoj, kiuj bezonas lian spiritan k organizan helpon ? Kial li ne ĵetas sin sur tiun kampon, trankvile lasante la SAT-anojn sekvi sian vojon laŭplaĉe k fosi sian sulkon laŭ sia bontrovo ?

Ne atendante, kion Bubu povus respondi, ni mem respondos : Ĉar SAT, kvankam ĝenata ankoraŭ per monŝuldoj el pli fruaj jaroj, kiuj treniĝas tra la buĝetoj, sukcesis kuraci siajn vundojn ĝis tia grado, ke hodiaŭ ĝi sen ajna risko povas aperigi regule siajn du dense kompostitajn gazetojn k sian Jarlibron. Montru, se vi povas, unu el la skismaj organizoj, kiu kapablas la samon ! Pruvu, ne per senbazaj asertoj, sed per faktoj, ke vin sekvas konscia, disciplina membraro ! Fariĝu, antaŭ ĉio, pli modestaj k ne fanfaronu pri 25.000 prolet-esperantistoj k similaj blufaĵoj !

Sed nun vorton pri la admono esprimita en la skribaĵo de K-do 17.146 : "Ni pruvu, ke esperantistoj ne sencerbe imitas..." Jes, K-do, pro tio SAT havas kiel bazon la sennaciecan strukturon k la konforman statuton, en kiu oni i.a. povas legi : "SAT, ne estante politika, sed nur kleriga, eduka, kultura

organizo, celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj k toleremaj rilate al la politikaj k filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj k sindikatmovadoj; per komparo de faktoj k ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj."

En tiuj linioj esprimiĝas la kvalitoj esence revoluciecaj de nia SAT-organizo, la originaleco de nia tasko, pro kio la tre profunda dinamika forto de nia asocio ne estas mezurebla per simpla ekvacio aŭ per cito de membrociferoj... Tion devas lerni kompreni la Gek-doj, ke havante en manoj tiun universaligan instrumenton, kia estas esperanto, ili estas kapablaj starigi al si unikan, tre difinitan taskaron en la proleta movado; ĝuste tion faris SAT k tio estas ĝia ekzistokialo. Ekipite per esperanto, ni povas elpaŝi al la konkreta, ne nur frazuma unuigo de l'mondproletaro sin pretiganta al dispremo de l'universale reganta kapitalismo.

N.B.

NI CELU SENNACIECON EN

AGOOJ K PENSOJ

En la momento, en kiu pluraj L.E.A-oj okazigas sian ĉiujaran kongreson aŭ konferencon, estas konvene eldiri kelkajn vortojn pri la rilatoj inter la Tutmonda movado aplikanta esperanton k la lingvoterritoria movado (propagandanta esperanton). Ĉar ankoraŭ ĝis hodiaŭ en iuj cerboj de laboristaj esperantistoj regas skeptikemo rilate la novan, kun tradicioj rompantan principon, por kiu daŭre pledas k kiun konstante aplikas SAT, k kiun oni plej bone povas nomi sennacieca.

Tiom pli necesas ankoraŭ trakti pri ĉi tiu punkto, ĉar kelkaj internaciistoj, t.e. homoj, kiuj konsideras kiel modelan k nesupereblan organizosistemon por mondorganizo tiun bazitan sur nacioj, sur landaj socioj, opinias, ke la integra aplikado de l'sennaci-

eca organiza sistemo implicas ignoron k malestimon al la L.E.A-oj.

Tio estas tute malvera. La plej bona pruvo pri la respekto, kiun SAT havas por la propaganda agado de la lingvo-teritoriaj asocioj, estas la Gotenburga Konvencio, kiu funkcias depost la jaro 1928 k kiu estas skrupule obeata de ambaŭ flankoj, de SAT k pluraj el la plej gravaj L.E.A-oj. Ankaŭ la avantaĝo ne estas unuflanka : ni memorigas pri la rimarkoj en la raporto de la F.L.E-estraro (1), kiuj atribuas al la influo de SAT sur la kreskon de l' federacio tre atentindan lokon.

Kiam ni parolas pri L.E.A-oj, ni ne pensas pri landaj asocioj naciskale starigitaj, sed ni parolas precize pri propagand-asocioj en lingvoregionoj. Ja, por la disvastigo de esperanto, la teritorio, sur kiu estas parolata unu k la sama lingvo, devas esti la agadbazo, sed ne regiono difinita per la politikaj landlimoj. Ĉar, por propagandi esperanton inter samlingvaj laboristoj, ja sufiĉas aparato, centro, kiu eldonas lernolibrojn, vortarojn, disaŭdigas radiolekciojn ktp. pere de la koncerna lingvo komuna al difinita regiono. Kaj se hazarde la politikaj ŝtatlimoj foje koincidas kun la lingvo-teritorio, tiam pro tiu koincido ne rompiĝas la principo.

Sed ofte lingvaj k naciaj limoj ne koincidas : Nederlandlingvio ampleksas la flandran parton de Belgio, Francilingvio ampleksas parton de Svisio, la valonan parton de Belgio, Anglalingvio ampleksas Usonon k la koloniojn k duonkoloniojn de l'Imperio, Portugalio kelkajn gravajn sudamerikajn ŝtatojn, same Hispanio, ktp, ktp.

La organizado laŭ lingvo-teritorioj sekve ne povas vekti aŭ pluigi naciismajn tradiciaĵojn en laboristaj mensoj, kiel tion faras organizosistemo kuniganta en Internacio aron da nacie apartigitaj societoj. La sennacieca organizo baziĝanta sur la individua membreco, malrekomendas do nur la laŭnacion apartigon de la propagand-asocioj, ĉar tia organizformo kontraŭas al ĝia idealo (forigo de ĉio naci-

(1) Labor. Esperantisto (Amsterdamo), Jubilea Libro de F.L.E.

eca el la proletaj mensoj). Tamen, praktike, SAT ligiĝas kun ĉiuj L.E.A-oj, kiuj agnoskas la pravon de ĝia starpunkto, pere de la Gotenburga Konvencio, k ĝi ne dependigas la amikan rilatiĝon kun la propagand-asocioj de duarangaj demandoj (diferencaj labormetodoj, aŭ sim.).

SAT en la praktiko kompreneble ne ĉiam k ne ĉiu-okaze povas simple malatenti la fakton, ke ekzistas nacioj, kiuj ne estas forbalaeblaj per la nuraj klopodoj de la esperantistoj sennaciece pensantaj. En la poŝtaj, teknikaj, administraciaj rilatoj sufiĉe ofte necesas konformiĝi al la nunaj sociaj leĝoj dekretitaj de la potenc-havuloj. Sed tio ne signifas, ke pro tiu fakto laboristaj esperantistoj estas devigataj propagandi sian lingvon strikte en la kadro de la nuna nacieca pensmaniero. Neniu faktoro malhelpas ilin organizi sian propagandon laŭ lingvoskalo (lingvoteritorie), sendepende de la ŝtatlimo. Tiurilate esceptojn povas formi nur diferencaj politikaj reĝimoj k el ĝi rezultantaj baroj.

SAT celas krei sennaciecan spiritostaton, tutmondan kulturon, tio signifas, ĝi celas liberigi la laboristaron pere de esperanto el la dogmo pri Nacio kiel io absoluta, io nedetruenda, konsiderinda. Certe, la SAT-anoj ne faras al si iluziojn pri la efektivigo de tiu ĉi celo en baldaŭa estonto. Ili provas laŭ maksimuma proporcio apliki siajn principojn, nenion pli...nek malpli. Kaj se la Jarlibro de SAT montras la mondkarton dividitan en SAT-sektojn (laŭ geografiaj horzonoj), anstataŭ la laŭlanda disdivido politika, k se en tiu broŝuro la aktivuloj de la Asocio estas vicigitaj en laŭalfabeta urboregistro tutmonda, ne laŭlanda, tio havas multe pli principan, edukan valoron, ol praktikan. Ni certe nur volas servi nian idealon per tiaj arandoj, kiuj ignoras la naciojn, k ni tute ne intencas anstataŭigi la malŝatigitan amon al Nacio per "SAT-sektora patriotismo"! Ni nur volas, ke la proletoj iom post iom perdu sian naciecan senton, ne plu konsideru sin kiel membrojn de nacio, por kiu indas oferi sangon k vivon.

La sennacieco ne estas utopio, ĝi estas io reale

ekzistanta. Ĉar jam nuntempe per vortoj k skriboj esprimiĝas sennacieca spiritostato. Kaj la ĝermoj kreskadas, k la burĝonoj plinombrigaĝas, k tiu evoluo daŭros seninterrompe, se nur ni vere volos k agos ĉiam celkonscie k ne flankiĝante. Al kritikantoj pri la sennacieca, vere esperantisma idealo ni respondu per pli intensa propagando, per plimultigo de niaj spertoj k ide-interŝanĝoj, per plugado serioza k klopodema sur la virga kampo de nova, tut-homara k socialisma kulturo.

Sennacieco restu utopio... por la esperantistoj, kiuj ne kapablas anticipi. Sennacieco estu faktoro de progreso por la konsekvencaj esperantistoj, kiuj tiras la lastan k logikan konkludon el la aplikado de l'universala lingvo.

N.B.

LA INSTRUOJ DE LA

SEPTEMBRAJ OKAZAĴOJ

La mondo, almenaŭ ties plej maltrankvila kontinento : Eŭropo, ŝanceliĝis serioze en la ĵus pasinta monato septembro; ja ĝi glitis survoje al nova mondmilito. Sed - vi tuj respondos - ĉu ne milito furiozadas jam de jaroj, en Hispanio, en Ĉinio? Jes, ni malpravus, se ni eĉ unu momenton malmemorus, ke en la nomitaj militoj diversaj imperiistaj rabuloj esperas trovi sian rikolton, k ke tiuj du regnoj hodiaŭ estas kvazaŭ ludkartoj en la manoj de interesitaj k konkurencaj ekonomiaj potencfaktoroj. La ludkartoj ŝanĝas posedanton de temp' al tempo, por refali poste denove en la antaŭajn manojn.

Sed, malgraŭ la egaj suferoj, kiujn devas elteni la popoloj turmentataj de la militfurio k malgraŭ la granda simpatio, kiun ĉiu K-do, ĉiu kunsentema homo sentas por la suferantaj loĝantaroj, ni devas konstati ke tiuj incendioj ne egalas je terurego k kruelego la brulegon kiu minacis ekflamiĝi la 28-an de septembro 1938. Kio prepariĝis en tiuj semajnoj k atingis kulminon en la nomita dato, tio estis abomenega, senkompare besteca buĉado, kian ankoraŭ

neniam vidis la Historio.

La laborista klaso, la ĉefa elportonto de la katastrofo, ĝia viktimo, same kiel en antaŭaj jam klasikaj buĉadoj, nia opinie havis nenian intereson en tio ke eksplodu la ĝenerala incendio. Kaj la proletaro ne povis, vid-al-vide de la propra senpoveco - fakto neneigebla - starigi kondiĉon por la konservo de la paco, rilate elekton de la roluloj k.s.

La paco estis savita en Munĥeno de personoj, kiuj certe ne pensis dum siaj intertraktoj pri la bonfarto de la laborista klaso de siaj respektivaj ŝtatoj; ili ne pensis, akordiĝante pri la ĉeĥoslovaka problemo, pri tio indulgi la vivojn de la mobilizitaj proletoj. Tamen, tiu konsidero estas duaranga; la unua, supera devas esti tiu konstato, kiun ni faris en la mateno de la 29-a de septembro, nome ke la paco estis savita.

o°o

Se iu ajn movado havas intereson pri neokazigo de mondmilito, ĝi estas la esperantista. Ne nur, ĉar ĝi estas mondskala movado k sekve la rompo de l' rilatoj inter diversaj ŝtatoj paralizus la aktivecon de ĝiaj organizoj, sed precipe ĉar la signifo de la lingvo esperanto mem estas intime ligita kun la ideo pri universala paco. Vi povas fingromontri, ke dum militoj (ekz. en Hispanio k Ĉinio) esperantistoj utiligas nian lingvon por informservoj. Sed tia informado estas ebla ankaŭ sen ekzisto de esperanto, per la helpo de multe pli larĝe disvastigitaj naciaj lingvoj... dum la aliigado de la spiritostato de homoj en monda skalo ne estas ebla sen esperanto ! Jen la granda diferenco inter la konceptoj pri la rolo ludenda de esperanto ! Iuj kontentiĝas difini al ĝi la lokon de helplingvo (por komerco, turismo, tradukservo, informado). En SAT ni substrekas la edukon, kulturan, klerigan rolon, kiun povas ludi - k dank' al SAT fakte ĉiutage jam ludas sur la batalkampoj.

Ni spertis en tiu ĉi monato septembro ĉe la homoj, ĉe la laboristoj ankaŭ, kies sorto ja speciale interesas nin, la ekziston de difinita spiritostato kreita el ĉiaspecaj influoj k tradicioj. Kaj ni pli ol

iam antaŭe tuŝe eksentis la gravegan bezonon de esperanto, de nia movado ! Ni ĉiuj, ekspirante la malŝargitan atmosferon de l'29-a de septembro, post la traelektrita aero de l'antaŭaj semajnoj, havis unu ekpenson : Nun necesegas urĝe per mil novaj fortoj reeklabori por "esperanto en la servo de la laborista klaso". Kaj tio signifas por ni : "esperanto disponigita al la proletaro kiel eduka k kultura faktoro", kiu malebligos iom post iom ĉe la homoj la kontraŭnaturan emon, la malraciecan preton sin liveri al buĉisto por servi ties interesojn, viktimiĝante sur la batalekampoj.

La esperantisto Honorato Burginjon sendis al SAT la 28-an de septembro manifeston, en kiu ni legas interalie, ke "morgaŭ, pro la volo de unu sola individuo, giganta fajrego povas bruligi niajn domojn...", ktp. Ne, Gek-doj ! Ne pro la volo de unu sola individuo tio povos okazi, sed pro la nuntempa malforto k senorientiĝo de la laboristaro kiel klasa faktoro k pro la en tiuj kondiĉoj ebla prospero relativa de la tiom ofte de socialistaj profetoj mortkondamnita burĝa klaso k de la mond-kapitalismo kun ĝia idearo !

°°

Kion ni spertas de post la lasta monato rilate esperanton ? Nur pri Francio mi raportas, kie mi povas proprokule kontroli la okazaĵojn. Parenteze dirite, alilandaj K-doj estas petataj informi per "S-ulo" ankaŭ pli ofte pri la stato de l'movado; estis ja interkonsentite, ke en nia organo okazu interŝanĝo de spertoj rilate la propagandan laboron...

Nu, en Francio la septembra mobilizo malfermis multies okulojn; la palpebla proksimo de la morto, kiu por iuj estus certa akiraĵo de la unua milita horo, la situacio de nepra buĉoto postlasis en ies cerboj neforgeseblan gravuraĵon. Oni revizis multfoje mondkoncepton. Kaj por ni, laboristaj esperantistoj, malfermiĝis vasta laborkampo. La grundo montriĝis pli facile kulturebla, ol antaŭe. Ĉu vi, Gek-doj en aliaj landoj, faris similan sperton ?

Vi povas legi en la "Kroniko" de ĉi tiu numero

pri kelkaj parizaj kursoj por komencantoj. Ni ne liveris ciferojn, ĉar la komenca nombro ĉe kursoj ne meritas esti statistikata pro la regula k neevitebla malpersisto de ioma elcento el la komencintoj. Sed, laŭ la ĝisnuna stato, ni rajtas esti optimistaj rilate la finrikolton. Tiuj kursanoj venis aŭ pro gazetanoncoj (la plej gravan kontingenton ĉifoje liveris anonco en la revuo de la Laika Centro de la Ĝiulian-Gastejo), aŭ pro persona varbiĝo. Ili venis al la kursoj kun dekomence fiksita celo; ĝi estas : utiligi esperanton por la senpera interkontaktiĝo kun alilandaj, alinaciaj gejunuloj, por internaciaj renkontiĝoj, k - ni notu ankaŭ tion - por akiri spiriton de mondcivitanoj. Kaj ili ne trompiĝos : kio eble sen esperanto aperis al ili nur intuicie, nur nebule, kiel vojo irenda por certigi al si la vivon ekster la kaĝo de l'nacia vivo, tio firmiĝos en ilia konscio post ellerno k dum uzado de la mondlingvo. Ilia menso pli k pli liberiĝos sin de naciaj antaŭjuĝoj, k neniu el ili akceptos la militon kiel taskon plenumendan de homo sin mem respektanta.

Ĉu necesas konkludo ? Ĝi trudas sin al ĉiu klare pensanta leganto : Ni eluzu ĉiun energion, ĉiun liberan minuton, por zorgi nian ĝardenon. Ni intensigu ĝis plej ekstrema grado nian agadon sur la laborist-esperantista kampo, nian laboron por SAT.

N.B.

R A C I A N I N V O K A S

Alproksimiĝante al ĝi dum malfrua vespera horo per aviadilo, tiu granda metropolo, kuŝanta sub nia rigardo en la vidokampo funde, aspektas kiel mirinda luma aranĝaĵo; la grandaj bulvaroj, la largaj avenuoj, ambaŭflanke lumigitaj per elektraĵ lumegiloj, preskaŭ simetrie trafluas tiun gigantan korpon, en kiu loĝas milionoj da homaj estaĵoj, de la plej junaj ĝis la plej aĝaj, kies vivogrundo ĝi fariĝis.

Alia estas la fizionomio de tiu moderna urbeĝo, kiam ni mem moviĝas, humilaj kaj robotaj, tra ĝiaj arterioj, kiam sufokas nin ĝia troŝargita atmosfero, kiam ni eksentas sur la brusto la efikojn de la venenaj

gasoj, kiujn ellasas senĝene miloj da aŭtomobiloj el siaj malbonodoraj ventroj. Ĉi tie brediĝas la kancero de la pulmoj. Ĉi tie rampas ankaŭ la diabl-eca inventemo de la gangsteroj, de la oficiale stampitaj, kaj de la multaj aliaj specoj sen etike-to, kiuj prirabas la honestulojn.

Pli ankoraŭ ol en la malnova centro, putranta pro sia ruiniĝo, se vi alproksimiĝas la ĉirkaŭurbon, vi subite troviĝas antaŭ neatenditaj dimensioj, - tiuj de urbeĝo, kiu transkreskis sian originan ka-dron; ja tie elkreskis el la virga kampa tero kiel fungegoj la loĝdomaroj ultramodernaj, kun maldikaj vandoj, sed kun plej lastdata komforto rilate hejt-ilojn, necesejon kaj bankuvon. La najbaro krie dis-sonigas sian radio-aparaton. Ĉu gravas? Tio estas ero de nia dudek-jarcenta kulturo.

De ĉiam ploraĉis en la domoj la ĵusnaskitoj kaj perturbis vian antaŭdorman vesperan ripozhoron. Ho-diaŭ tio simple aldoniĝas al la bruoj de la mekani-kaj aparatoj. Kompense vi ne plu estas ĝenata per la naturaj voĉkoncertoj de la dombestaro, de la kort-birdoj kaj ceteraj.

Kiam la laboristaro modern-epoka ekribelis kontraŭ la mastraro kaj ekentreprenis paŝojn por sia liberiĝo, unu el ĝiaj vicoj, en Francio, verkis "La Internacio"n inspirita de la kolektiva sento tiam reganta inter la ekspluatatoj. Ĝiajn strofojn, precipe la unuan, oni de tiu tempo aŭdis en multaj lingvoj (ankaŭ en Esper-anto), en sennombraj manifestacioj, kaj en ĉiuj lan-doj de la tero. Oni aŭdas ĝin en SAT-kongresoj, oni aŭdas ĝin ĉe politikaj manifestacioj publikaj, oni aŭdas ĝin en malliberejoj...

Sed ĉu oni ĉiam pensas pri la senco de tiu linio: "Raci' nin vokas... al mortbatalo pro l'liber' "...?

Multspecaj estas la interpretadoj de tiu signifo-plena vorteto "LIBERO". Tiu vorto ŝanĝis ofte signi-fon tra la aĝoj kaj epokoj de la homaro. Sed ĉiu est-aĝo, eĉ besto - kaj ne nur la altrangaj sed eĉ la plej subklasaj bestoj - konscias pri "libero" kaj "mallibero".

Oni povus eĉ diri, ke teksigis reto da tragiko ĉirkaŭ tiu ĉi nobla vorto, kiu difinas la sopiron de

ĉiuj homoj, de ĉiuj vivaj estaĵoj - idealon malofte atingatan de tiu aŭ alia individuo - kaj pli reve ol reale.

Kelkaj atingas la liberon nur kun sia morto, t.e. liberon el fizikaj aŭ moralaj suferoj; aliaj vidas liberon nur en ekonomia sendependeco (posedo de sufiĉaj monrimedoj por vivteni sin senzorge) - tiu kategorio entenas la grandan plimulton de niaj kunvivantoj. Ekzistas ankaŭ iuj, kiuj vidas liberon en tio, ke ili sukcesas eliri la senkompatan cirklon, kiun forĝis ĉirkaŭ ili heredaj faktoroj. Ne tre multaj estas tiuj, kiuj aspiras veran spiritliberon - kaj tiuj, se ili kredas esti atingintaj tiun stadion tre altan, ofte fariĝas malamikoj de la cetera homaro, nesociemaj estaĵoj, apartiĝemaj stranguloj...

Por la aŭtoro de "La Internacio" kaj la tiutempa kamaradaro tutmonda temis efektive pri liberigo el socia premo: tiuj socialistoj celis sincere kaj, puŝataj de la propra situacio de laborsklavoj, emancipi ne nur sin mem, sed ĉiujn samklasanojn el la kapitalisma jugo. Tio ne signifis, ke ĉiuj reprezentantoj de la tiama proletaro estis senmakulaj altruistoj. Sed la granda amaso, kiu sekvis la standardojn de la Socialista Internacio, kaj poste de la Dua kaj de la Tria Internacioj, estis impulsata de la komuna sorto de la laborularo kaj ne nur pensis plibonigi sian personan sorton.

Tamen ni ne forgesu, ke ĉiam kaj ĉie temis pri liberigo de la individuo, egale ĉu tiu liberigo staris sub la devizo nacieca, religieca aŭ pure socia kaj klasbatala. La profunda deziro liberiĝi el prema situacio (esence ekonomia) estas enaskita al ĉiu estaĵo - kaj se niaj poetoj kaj dramverkistoj elektis elstarajn personojn (heroojn) por suflori al ili la parolojn, kiuj emfazas la idealon de Libero - kiel Goethe en sia versdramo "Faŭsto", Viktor Hugo en "Hernani", Beethoven-Egmont en sia muzikdramo "Fidelio" - tio okazas nur por prezenti interpretistojn de tiu ĝenerala deziro pli kvalifikitajn ol simpla homo el la popolo...

Bedaŭrinde, hodiaŭ kiel en la pasinto, multaj individuoj havas nenian percepto-kapablon pri sia mallibereco. Ili iluziiĝas, eĉ ebriiĝas pri ĝuo de ŝajnli-

bero, kiu estas tute nedaŭra, malkompleta, fragmenta kaj povas kontentigi nur la plej malaltajn materiajn instinktojn.

Hodiaŭ kiel en lapasinto ! Se la koncepto pri libero estas diferenca por individuoj (kaj eĉ iafoje por tutaj kolektivoj !), nu, necesas konstati, ke ĝi okulfrape diferencas en la menso kaj en la konduto de la homoj laŭ la epokoj, eĉ en etapo de generacio al generacio.

Tiel same ekzemple estas rilate artkonceptojn kaj rilate sociajn aspektojn. Ili varias laŭ la epokoj.

Aŭskultu la muzikadon de la trubadoroj kun iliaj amkantoj, kaj aŭskultu la post-mezepokan instrumentan muzikon. Tie ne temas pri malsameco de tekniko, sed pri malsameco de sent-esprimado.

Kaj tamen... la Amo kiel baza sento de ĉiu vivaĵo ne multe diferencas en nia moderna epoko de alta civilizo de tiu de la prahomoj kaj de la... bestoj, same la naskado ĝenerale restas (feliĉe!) tute natura afero, ĉe reĝino ekzakte kiel ĉe proletino ! Temas pri la artesprimo, kiu ŝanĝiĝis, en muziko kiel en pentrarto kaj literaturo.

Ne plu estas modo grimpi sur barikadojn por "mortbatali pro l'liber'", t.e. akiri la politikan kaj socian liberojn por la malriĉaj klasoj. Ja ekzistas multaj aliaj rimedoj, kiujn oni ankaŭ povas konsideri kiel esence revoluciajn, en nia nuna socio, por atingi ke ĉiuj individuoj ekhavu la dignon de liberaj homoj.

En SAT ni aparte celadas atingi tion per aplikado de nia komuna lingvo Esperanto. Ni penas, por ke Esp. kaj SAT-ideoj disvastiĝu en ĉiuj kontinentoj kaj ĉe ĉiuj popoloj, alt-evoluintaj aŭ ne. Ni vidas klare la danĝeron de malsamaj evoluŝtupoj : ni tial salutas la stariĝon de mond-organismo kiel UNESKO, kiel rezultato el la pasinta katastrofo - organismo kiu havas intencon kaj planojn por forigi la analfabetecon en subevoluintaj landoj kaj levi ĉie la ĝeneralan materian kaj kulturan nivelon. La decido pri fondo de UNO kaj UNESKO estis kvazaŭ asekuro de la pli riĉaj ŝtatoj kontraŭ konfliktoj naskiĝontaj el landoj kun grandega malriĉularo.

Tamen la atingo de tutmonda civilizo sur sama nivelo estas ankoraŭ malproksima idealo. Ne sufiĉos por tio la monrimedoj, kiom ajn ampleksaj, de UNESKO. Kaj kiom da perturboj ankoraŭ okazos antaŭ la ĝisatingo de tiu monda unueco revata !

Ni konas la historion de alt-evoluintaj kulturoj, kun superaj inventoj kaj artkreado impona - ili pereis unuj post la aliaj pro la kruda perforto de invadantoj militemaj, troviĝantaj en barbara evolu-stadio. Ni pensu nur pri Asirio, Babilonio kaj Egiptio, brilaj civilizoj en la antikveco, dronigitaj senkompate kaj senrevene sub la impet-atakoj de sovaĝaj gentoj; kaj la loĝantaroj estis sklavigitaj...

Ne sufiĉas do, ke parto de la mondpopolaro ĝuas liberecon, demokratecon kaj komfortan vivnivelon, se aliaj ekpretigas sin por pereigi ĉi tiujn enviindajn aferojn !

Racio nin vokas sekve subteni ĉion, kio povas servi al liberigo de la individuo en la tuta mondo; kaj al tio esence apartenas la mondlingvo.

N. Bartelmes

K I O N N I R A J T A S P O S T U L I

Ni SAT-anoj estas kuntrenataj en la fluo de nia epoko kun ĝiaj ofte konsternaj kaj kontraŭecaj okazaĵoj. Ni kunpuŝiĝas survoje kun inteligento kaj mal-inteligento, kun honesto kaj malhonesto, kun veremo kaj lojalo unuflanke kaj kun malsincero kaj trompemo aliflanke, kun senskrupula ekspluatemo, fizika kaj intelekta, kies efikojn ni ĉiuj spertas, sed kontraŭ kiuj ni ne posedas armilojn sufiĉe akrajn. Ĉar la ŝtato kun sia potenco - se ĝi ne rekte subtenas la kanajlojn - almenaŭ nenion faras por bremsi kaj likvidi ilian agadon.

Nia SAT-movado, kiel entute la esperantismo, naskiĝis pro fido en la homaro, en ties sana kerno, unuvorte en ties elito. Ĉu la homoj, al kiuj adresis sin Zamenhof kaj Lanti, respondis favore, konkrete, pozitive al ilia laŭta kaj konvinkita voko ?

Oni ne rajtas respondi per abrupta "ne". Sed oni devas konsideri, ke ekde la unuaj paŝoj de la Movado la pioniroj renkontis rigidajn obstaklojn en multaj landoj de la mondo. La diversaj faŝistaj reĝimoj komplete sufokis la esperantismon, kaj... tute aparte la Laboristan esperantismon. Laŭ historia paso la edikto de Hitler kontraŭ esperanto estas relative novdata. Antaŭe malfavoris aŭ malpermesis la movadon Horti, Pilsudski, Aleksandro, Salazar kaj ... Stalin. Kaj nian epokon tuŝas la ĝenoj kaj malfavoroj de Salazar kaj Franko.

Por SAT venis ondo da malhelpoj kaj malpermesoj post la Dua mondmilito. La plej tipa estas tiu de Ĉeĥoslovakia registaro, kie tamen la laborista esperantismo en ĉiu tempo havis bastionojn. Tre kruele efikis ankaŭ la malpermeso de la germana orienta respubliko (Ulbricht). Tie ĉiuj iam prosperaj grupiĝoj estas disfalgigitaj de rigora reĝimo kontraŭ-esperanta. Kaj sub Kruŝĉev ne multe plibonigis la perspektivoj por esperanto kaj SAT en la vasta Sovetio...

Ĉu mirige, ke amputita SAT-movado ne mordas tiel profunde, kiel ĝin supozus ĝia tutmonda karaktero?

Kaj tamen - malgraŭ la sistema forbarado en tiuj landoj, kie esperanto "ne estas ŝatata" (laŭ milda termino uzata de iuj en tiaj kazoj), apenaŭ tolerata aŭ severe malhelpata (ni nomu ankaŭ Turkion), aŭ kie la analfabeteco prezentas unuarangan obstaklon, ne kreante la antaŭkondiĉon por disvolvo de E-movado, - malgraŭ tio esperanto ne plene pereis en la menso de individuoj en tiuj regionoj, kaj ankaŭ la SAT-ideoj restas vivplene pluĝermantaj tie, kie iam ili estis enplantitaj en pli malpli favoraj cirkonstancoj.

Sed... ni ja postulas pli - multe pli!

En ĉiuj landoj, almenaŭ en tiuj, kie nia SAT-vivo iam estis vive brilanta kaj kie ankaŭ nun ni povas esperi pri konstanta kaj persista aktiveco de nia membraro - ni renkontas kursgvidantojn, kiuj ne trovas lernantojn - personojn pretajn instrui nian lingvon, sed kiuj ne kapablas kolekti ĉirkaŭ si lernavidajn homojn. Antaŭ la lasta mondmilito ĉiam la personeco de la kursgvidanto certigis la sukceson, almenaŭ

relativan, de kurso. Kaj la kursoj, preskaŭ ĉiam organizitaj laŭ la iniciato de Esp. societoj aŭ asocioj, malofte sub aŭspicioj de oficialaj instancoj, reprezentis aŭtoritaton kun granda morala influo. Ili ligis homojn, alkitimigis lernantojn kaj iom post iom tiris ilin en nian asocion.

Certe, tiuj metodoj estas aplikataj ankaŭ hodiaŭ de niaj organizoj kaj de niaj bonvolaj kursgvidantoj. Sed la rezultoj ne estas la samaj. Fido mankas en la valoro de nia movado.

Ni komprenas la esperantistojn, eĉ iujn SAT-anojn, kiuj - pro ĉiuj ĉi malhelpoj - vidas ununuran solvon en la starigo de instruplano esperanta en lernejoj aŭ aliaj institucioj ŝtate aŭ distrikte subtenataj. Sed en nia Asocio tiu perspektivo ne devas esti la sola, vidata ĉe la horizonto; SAT devas apogi sin firme sur la aktiveco de la individuaj membroj, kiuj enpenetras tiun aŭ alian medion laboristecan: Naturamikoj, sindikataj grupiĝoj, kooperativa movado, k.a., por varbi tie elementojn kiuj posedas guton da idealismo en siaj vejnoj. Ve! ili estas sufiĉe malmultnombraj nuntempe.

Certe, - se oni tralegas broŝurojn kaj artikolojn el pli fruaj periodoj, koncernantaj pasintajn generaciojn, ni konstatas, ke ankaŭ tiam oni plendis pri la neseriozeco de l'junaj homoj, pri ilia materialismo, ilia ĝuavido, ilia frivoleco. Ne kredu, ke, se ni substrekas tiun fakton por la hodiaŭo, tiuj riproĉoj kaj kritikoj ne simile estis farataj dum la pasinto.

Se personoj ne vidas perspektivon pri praktika utiligeblo tuja, pri palpeblaj rezultoj post penado de lernado de la lingvo, kiel persvadi ilin por ke ili fidu en atingajo de tute nebula estonto?

Tian seniluziigon ni celas eviti en SAT, kie la kamaradoj devas akiri ekde lernado de la lingvo la senton, ke ili ligiĝas al kolektivo, kiu vere akordiĝas pri la nepra neceso de komuna lingvo por solvi la plej gravajn problemojn de la homa socio, tiujn de paca kunvivado eksternacieca, de normala evoluo de la teknika progreso postulanta urĝe la unueciĝon de la homloĝantaro kaj sekve ankaŭ uzadon de universala lingvo parolata de ĉiuj.

Se ni praktikadas esperanton hodiaŭ samè fervore, same obstine kaj persiste, kiel hieraŭ kiam la lingvo troviĝis en sia infan-aĝo, tiam ni faras tion por demonstri al la publiko nerefuteble, ke esperanto estas vivkapabla, sed plie, por pruvi ke esperanto servas plenalore en la interfratiĝo de la laboristaj amasoj diverslingvaj. Krome nia SAT-aktiveco montras al ĉiuj, kiuj pretas malfermi siajn okulojn kaj orelojn, ke estas eble perdi iom post iom sian naciecan senton kaj sekve liberiĝi el tiu narkotilo, kiun tenas super ni la registaroj (kiel la karoto, kiun svingas la mastro antaŭ la nazo de sia azeno).

Kiam ni estos akirintaj la kapablon pensi, senti kaj agadi sennaciece, ni estos farintaj grandan paŝon survoje al vera homlibero.

N. Bartelmes

1. M A J O 1 9 4 5

1. M A J O 1 9 6 5

Antaŭ 20 jaroj Hitler sin mortigis en la bunkro de Berlino, kien li estis rifuĝinta antaŭ la elaeraj bombardoj. Sed en la 1-a de majo 1945 tiu ŝirmejo perdis sian valoron, kvazaŭ izolita oazo meze de atakokupantaj rusaj trupoj, kiuj el ĉiuj flankoj enpenetris la germanan ĉefurbon. En tiu tago ne plu la bombard-aviadiloj, sed artilerio kaj tankoj decidis pri la kapitulaco de Berlino kaj sekve de la tuta regno, finante abrupte la revitan miljaran regadon de la naci-socialista tiraneco.

Dudek jaroj estas relative longa periodo, precipe se tiu jardudeko komenciĝis per kataklismo, kiu ŝanĝis en ĉiuj zonoj de nia tero morojn, konduton, vivmanieron, artojn kaj ofte eĉ la bazajn vivkondiĉojn.

Fakte la fino de la Dua Mondmilito vidis leviĝi generacion, kiu komplete rompis kun la pasinto. Certe, multaj junaj geĥomoj ankoraŭ nuntempe respektas la valoraĵojn kreitajn en antaŭaj jarcentoj; oni ne anatemis la klasikismon en la artoj. Male, post iom longdaŭra ebriiĝo pri novaj formoj kaj esprimmanieroj granda parto de la nuntempularo denove revenas al la solidaj valoroj de geniaj kreintoj el la pasintaj

jarcentoj.

Restas tamen la fakto, ke la pliintensiginta maŝinismo, la daŭre progresanta specialiĝo en profesia laboro, la formado de ekskluzivaj teknikistoj kun kapabloj tute unufakaj, donis komplete ŝanĝitan aspekton al nia kunvivado en la socio.

La rompo kun la hitlerismo estis drasta en la nova Germanio, displitigita en multajn federaciajn ŝtatojn, sen efektiva aŭtonomio. Mi mem observis la postmilitan junularon germanian, kiu eksurpaŝis novan vojon, aŭde serĉis tiun demokration, pri kiu laŭde parolis al ĝi la venkintoj. Estis ofte amara seniluziĝo kiel sekvo, tamen tiu ne puŝis la junulojn direkte al la bolŝevismo - kiel okazis al tre multaj junuloj post la fino de la unua mondmilito.

Certe tiuj junaj homoj ne meditis kun pentemo pri la okazintaĵoj de l'milito, kiujn ili apenaŭ konscie partoprenis kaj ne kapablis analizi. Ili ne havis konsiderojn por tio, ke la germana militestraro, obeata aŭtomate de la ordinaruloj en uniformo, mistraktadis kaj sklavigadis milionojn da estaĵoj, detruis milionojn da homaj vivoj en orienteŭropaj landoj... nek por tio ke la vengosento estis kvazaŭ natura fenomeno, kiu peze trafis kun iuj kulpuloj multajn meznormajn ordinarulojn, kiuj partoprenis la militon nur kiel viktimoj... nome, kiam ili trafis en militkaptitecon en Rusio, el kie nur malgranda elcento revenis post longaj jaroj... Sekve de tio la reĝimo en Sovetio post la disfalo de l'naziismo en 1945 ne logis la germanan junularon, el kiu la pli multaj devis funebri pri siaj patroj, fratoj aŭ onkloj pereintaj en iuj sovetiaj laborkampoj.

Kiel ajn estu, en tiu 1-a de majo 1945, same kiel jam okazis dum la kelkaj teruraj jaroj antaŭirintaj, neniu civitano en la mondo havis la ideon memori pri la Tago de la Laboristaro. Oni vidis nur unu grandiozan eventon: la falon, en tiu tago, kun ega frakaso, de la hitlera piramido, kun la estro ĉekape. Kaj tiu falo elvokis ĉie senton feliĉegan de liberigo!

En la mondo necesis krei ion vere novan, iun tute ŝanĝitan ordon. Kiuj revenis el la milit-frontoj aŭ

kaptitejoj al siaj hejmoj, la liberigitoj - ili devus fari tiun novkonstruadon. Ni laboristaj esperantistoj, kiuj vivis kune en SAT dum la antaŭmilitaj jaroj, baldaŭ retrovis unuj la aliajn - tuj kiam eblis restarigi korespondadon kaj personajn kontaktojn trans la limojn. La 1-a de majo 1945 ne estis solenata kiel Tago aŭ Festo de l'Laboro, de l'Socialismo. Sed ĝi fariĝis tamen deirpunkto por nova socialismema agado. Ankaŭ inter la esperantistoj.

Ili regrupiĝis amase ĉirkaŭ SAT, ne nur la iamaj membroj, sed ankaŭ multaj novaj, kiuj ekkonis la neceson de komuna lingvo por la tutmonda laborularo.

Tiel la unuaj postmilitaj jaroj estis ekstreme esperigaj kaj promesplenaj por nia SAT-movado, kiu rekreskis rapide, kun partopreno de novaj, junaj elementoj.

Hodiaŭ, en majo 1965, kien ili fuĝis? Kial ili fuĝis? Certe, por eŭropaj landoj, por Usono, Kanado, Aŭstralio, unu faktoro estas signifoplena: - la pli bona materia stato de la loĝantoj. Por subevoluintaj landoj ludas rolon la faktoro "instigo" kaj "ekzemplo". Estas kompreneble, ke la eŭroplandaj pledantoj por Esperanto kaj SAT devas iniciati la varbadon en aliaj kontinentoj. Ili devas formi la kernon, la trunkon de la organiza konstruaĵo. Se mankas ĉia iniciatemo el eŭropaj landoj, kiel oni povus esperi je sukceso por enplanti nian aferon en landoj de Afriko aŭ Azio?

Se multaj gejunuloj, kiuj venis en nian Asocion, en niajn grupojn postmilite, ne persistis, oni ne akuzu pri tio nur la televidon kaj la motorciklon, - certe atentindaj kaj danĝeraj murdistoj de sinokupo pri idealaj movadoj - ja temas plej ofte pri perdo de iluzio, pro nealveno de rapida kaj konkluda triumfo. Tiu manko de realiĝo kaŭzis multies foriron...

En tiu ĉi majo 1965 ni restas konvinkitaj, ke neniu registro, neniu aŭtoritato sukcesos plu forviŝi el la homaraj aspiroj la idealon pri komuna universala lingvo. Al ni SAT-anoj, laboristaj esperantistoj, la tasko fosi daŭre nian sulkon kaj fekundigi la terenon, sur kiu stariĝos nova socio, en kiu oni parolos la lingvon de la Estonto.

N. Bartelmes

Kiam ni ĵetas nian rigardon sur la hodiaŭan mondbildon, ni rimarkas anstataŭ unueco kaj komuna fortostreĉo por akiri novajn sciencajn rezultatojn sur ĉiuj kampoj de la homa aktiveco, transdaŭradon de l'imperiismaj antagonismoj kaj intrigoj; ĉi tiuj en unu aŭ alia regiono de la terglobo kondukas al eksplodoj, kiuj sange vundas tutajn popolojn. Sed pri tiuj eventoj apenaŭ ekatentas la malproksime de tie loĝantaj homoj, ekster la trafita parto, pensante nur pri sia propra bonfarto kaj kvieto. Oni parolas konstante pri paco kaj pri ĝia certigado, sed efektive nur malmultaj homoj vere kun antaŭtimo, prikalkulas la konsekvencon el la nuna milit-irado en pluraj kontinentoj.

Inter la malmultaj homoj de nia epoko, kiuj ne nur klare vidis la danĝeran situacion, sed ankaŭ proponis solvojn, elstaras k-do Lanti, kies sociopolitika teorio trovis, tempon post lia morto, pli kaj pli da adeptoj eĉ ekster la esperantista medio. Nia usona pionira kamarado Mark Starr liveris al ni plurajn ekzemplojn pri gvidantaj personoj en Usono, kiuj venis al la konkludo de Lanti, ke unuigita mondo estas ebla nur pere de... sennaciismo.

Sed ĉe la simplaj homoj, ĉe la laboruloj, malgraŭ ke multaj inter ili konsideras sin kiel avangarduloj kaj progresemluloj, tiu spiritostato, nome konscia eliminado de la nacieca kaj naciisma sento, ankoraŭ ne enradikiĝis, faris apenaŭ progreson. Kaj dume la terglobo pli kaj pli malvastiĝas dank'al la moderna tekniko kaj ĝiaj aparatoj mallongigantaj la distancojn...

En la "socialisma" parto de la mondo la vorto "kosmopolitismo" estas anatemita, tiel de Sovetio, kiel de ĝiaj satelitaj ŝtatoj kaj de Ĉinio. La tieaj regantoj timas la malfortiĝon de la nacieca sento, ĉar tiu sento estas unu el la kolonoj, sur kiuj staras la politika konstruo: la nacioj formas la Internacion, en kiu ĉiu konservas siajn proprajn ecojn, sian propran lingvon kaj sekve... sian propran pensmanieron, malgraŭ la komunaj gvidvortoj. Tiu obstina

restado ĉe la stadio Nacio estas identa ĉe la "socialismaj" landoj, kiel ekz. ĉe la Francio de De Gaulle.

Lanti konsideris la vorton "kosmopolito" ne samsignifa kun sennaciismo. Kosmopolito signifas laŭ Lanti riĉan turiston kiu amatore vizitas diversajn landojn kaj kontinentojn, loĝas en unuaklasaj hoteloj, uzas nur sian propran nacian lingvon, escepte se li snobe balbutas kelkajn frazojn el la lingvo de la lando kiu gastigas lin. Kompreneble tiu persono ignoras la landlimojn, sed ankaŭ komplete malinteresiĝas pri la sorto de la popoloj, en kies lando li parazitias.

Sed kiel ajn konsideru la regantoj, okcidente aŭ oriente en la mondo, la sennaciismon, tiel kiel Lanti prezentis tiun teorion, ĝi estas nek "etburĝa", nek nur antikapitalisma, - ĝia esenco estas multe pli profunda, ĉar ĝi skuas la fundamentojn, sur kiuj nia sociordo estas bazita : ĝi subfosas la ne plu aktualan patriotismon, tiel en ĝia plej milda esprimo, kiel en ĝia plej agreseca (la ŝovinismo). Kaj nian tutan mond-ordon regas la Ekonomio kaj ĝiaj baraktoj kaj antagonismoj. La mastroj de la Ekonomio ignoras la naciecojn; ili rekonas la landlimojn stariginte la regulojn de la dogan-impostoj; sed ili ludas per ĉi lastaj, kaj ili akceptas principe la European unuiĝon, kiam ĝi servas iliajn interesojn pure komercajn kaj monopolajn. Ankaŭ la nov-kreitaj nacioj en Afriko servas malgraŭ siaj naclaj elmontraĵoj, standardoj, konsulejoj, naciaj himnoj ktp. en la ekonomia plano unike al la ĝeneralaj reguloj de la kapitalisma mond-ordo. Se la forto de la grandaj potencoj (Usono, Sovetio, Ĉinio, k.a.) dependas ideologie de la kredemo nacieca de la homaj amasoj - ja ankaŭ en la "socialismaj" ŝtatoj la baza strukturo restas nacia - ĝi dependas esence kaj reale de la ekonomia bonfarto kaj disvolviĝo.

La revolucia ideo de Lanti estis starigi kontraŭ la realisme kosmopolita kapitalismo kaj monopoleco sennaciecan fronton de la laborularo (proletaro). Kaj ĉar, laŭ li kaj nia propra opinio, la eterna uzado de naciaj lingvoj ne permesas al la proletoj akiri sennaciecan menson, tial Esperanto estas ilo

absolute necesa por la liberigo de la tutmonda laborularo, por ĝia emancipiĝo kaj por triumfigo de la Socialismo en ĝia plej nobla, perfekta aspekto. Socialisma socio unika (mondskala, eĉ nur eŭropa) ne estas imagebla sen komuna interkomprenilo. Sen Esperanto la miskomprenoj inter diverslingvaj homoj daŭre ripetigus, senelire.

Hodiaŭ oni en kelkaj okazoj kun amaro konstatas la mankon de la lingva interkomprenilo; tiel ekzemple ĉe internaciaj sport-manifestacioj, kie tamen la "aktoroj" amike konkuras sur la sama tereno kaj kun la sama spirito de frateco. Ankaŭ la Naturamikaĵoj kaj multaj kulturaj societoj organizas renkontiĝojn inter diversnacionoj, kaj ili puŝiĝas ĉiam denove kontraŭ la lingva muro. Mankas la ponto, mankas Esperanto.

Malmultaj spiritaĵoj, kiel Ejnŝtejn kaj Romen Rolland, konsentis cedi, rilate la valoron de Esperanto; ili akceptis honorprezidantecon super SAT-kongresoj, ili eldiris favorajn vortojn por nia idealo. Tamen ili persone ne alproprigis al si esperanton.

Tute objektivite juĝante oni trovas, ke vere nur en niaj vicoj oni trovas homojn, kiuj konscie dediĉas sin al konstruado de nova soci-ordo sennacieca - sola ordo kiu garantias pacon kaj interkomprenon kaj la antaŭeninon venkan de la socialismaj ideoj. Per la praktiko de esperanto ili faras multe pli por la realigo de l'estonta tuthomara socio ol ĉiuj belparolistoj en la diversaj sociaj organismoj ĉiulandaj. En la fakto niaj kontaktoj, niaj kongresoj kaj renkontiĝoj estas la unua vere konkreta paŝo sur tiu tereno - paŝo subtenata konstante de monato al monato, de jaro al jaro per la skriba esprimo kaj instigo en la artikoloj, kiuj aperas en la SAT-gazetoj.

Tie limiĝas la ĝisnuna aktiveco. Esperanto venkos, kiam la terloĝantoj estos maturaj kaj pretaj agnoskian lingvon kiel mondlingvon, kaj ne nur kiel apenaŭ movkapablan, anemian helplingvon sur lambastonoj.

K O S M A J F A J R E R O J

Sur siajn samtempulojn la kenigsberga filozofa Kant havis gravan influon. "La stelumita ĉielo super mi, la morallego en mi" estis lia devizo, kiu resumas lian prikosman konsideron. La homo morale vivanta kaj aganta kontaktas fratece kun la makrokosmo (universo), kvankam mem nur mikrokosmo - individuo movata de sentoj kaj emocioj kaj rafinanta ilin en pensoj. Kiel ekzemplon ni citas la "naŭan simfonion" de Beethoven, en kiu la Kanta metafiziko trovas subliman esprimon per sonoj de muziko.

Por Kant tiu materio, el kiu formiĝis nia terglobo same kiel ĉio, kio ĉirkaŭas nian mondon kaj al kio ni povas rigardi percepte per niaj homaj okuloj, aŭ, pli distinge ankoraŭ, helpe de teleskopoj - de la homo inventitaj instrumentoj - ekzistas nur en rilato kun la persona valoro de ĉiu unuopa homo. Ties sinteno devis starigi iun harmonion inter la interno (la psiko) de l'perceptanta homo kaj la eksteraĵo, kiun observi estas permesate al li. La milionoj da astroj, kiuj lumas sur la firmamento, nek por la filozofa, nek por la poeto estas mortaj materieroj, similaj al tiuj, kiuj konsistigas la terkruston kaj ĝian ardfajran kernon. Ili obeas difinitan leĝon, same kiel la unuopa homo, kiel ĉiu vivanta estaĵo sur la tero, kiel la homaj kaj animalaj kolektivoj - antaŭ tiuj, kiuj laŭ ĉiu probableco surloĝas aliajn astrojn kun temperaturaj kondiĉoj, kiuj permesas la kreigon de vivo. Tiu leĝo nur laŭkvante, laŭstape kaj laŭaspekte diferencas ĉe la diversaj vivofenomenoj en la universo.

Kiel ĉiu filozofa, Kant celis eltrovi ne nur la leĝojn, kiuj regas la universon kaj difinas ĝian funkciadon, sed ankaŭ ĝian ekzistokialon kaj originon, en la kazo se origino estas hipotezata kaj ne simple agnoskata senfineco de spaco kaj tempo, kiel la nefiniteco de la nombroj en matematiko.

Nepre rekonante la valoron de la teknika progreso en nia epoko, ni tamen starigas la demandon, ĉu ne tromemfidus tiuj teknikistoj-inĝenieroj, kiuj

inaŭguris la eraon de l' spacveturado. Post satelitoj aŭtomate reguligataj el la stacioj sur tero, nun similaj entenantaj homojn estas lanĉataj sur orbiton, ĝis ĉirkaŭflugo de nia amika satelito Luno.

Ni gratulu nin pri tiu konkurado pacaspekta, en kiu unu el la grandaj potencoj, ĉu Usono, ĉu Sovetio, klopodas atingi kiel unua la konkeron de l'universa spaco en nia sunsistemo - do ĉiuokaze etskale kompare al la nekalkuleble granda spacego, kiun ni nomas Kosmo aŭ Universo. Ĉar tiu konkurado unuavice servas al scienca esplorado, kaj scienculoj el ambaŭ ŝtatoj ambicias por esti la unuaj. Oni ĝenerale en la nuna stato de tiu esplora laboro lasas ekster konsidero la permilitan ekspluatadon de tiuj aŭdacaj spacovojagoj; tamen la realigantoj estas arme-alkomanditoj; tiu fakto vokas en nian konscion, ke ĉiuj teknikaj inventoj iun tagon estos utiligataj serve al interhoma eksterma batalo.

La filozofoj de la 19a jarcento, kies precizeco en pensado estas admirinda, ne povis imagi, ke iam homoj tiel proprakorpe traflugus pecegon de l'universa spaco, turniĝante ĉirkaŭ la propra planedo kaj eĉ ĉirkaŭ la multdistanca satelito. Sed ĉu pro tiu fakto ili tirus aliajn konkludojn, ol ili faris? Ĉu la spacveturoj malkovrigas al ni alion ol materiojn el simila konsisto kiel tiuj, kiuj tenas en ekvilibro, meze de la universa spaco, nian Teron?

La penso estas pli rapida kaj pli penetra ol la plej perfektaj aerveturiloj. Kaj la mirindaĵo ne estas en tio, ke homoj aŭdacas traflugi spacon je 40.000-kilometra rapido pohore, sed en tio, ke la homa cerbo permesas, sin bazante sur spertoj de la sentumoj, percepti kaj koncepti ion konkretan transe de la propra hejmplana vivo kaj konstrui sur tiuj hipotezoj, pli malpli ĝustaj, sistemon, en kiu Spaco kaj Tempo konsistigas unuon (monismo). E. Lanti, filo de la lasta kvarono de la 19a jarcento, vidis en la monismo la plej racian klarigon pri senco de la kosma vivo.

Psike, ideoj kaj laŭ la morala aspekto la modernaj spacveturadoj ne povas havi ŝanĝan influon sur la

homojn : - iuj estas religiemaj, dikredantoj, kaj ili restas tiaj, spite la teknikajn progresojn kaj kun tiuj ligitajn eltrovojn, kaj malgraŭ la fakto ke tiuj progresoj estigas ŝanĝitan sintenon de la homo al la socio - aliaj estas monistoj, nekredantoj, egale ĉu inklinaj aŭ ne al filozofado - ĉar nenian certecon donas la spac-esplorado pri la esencaj problemoj pri origino kaj kialo de la Kosmo, problemoj kiuj okupas la homan spiriton, de kiam homoj kapablas racie pensi kaj abstrakti.

La plej granda unuo (la makrokosmo) kaj la plej malgranda unuo (la infinitezimo) estas laŭ nia logiko senfinaj, senlimaj; ni ja rigardas kaj reagas laŭ la perspektivo de homa estaĵo vidpove limbarita.

La nuntempaj scienculoj formulas tian koncepton, kiel ĝi estas esprimita de franca astronomo James Lequeux (de la astronomia observatorio en Meudon) per jenaj frazoj en la dua volumo de "Ĝenerala Enciklopedio" de Larousse, ĵus publikigita : "...Ŝajnas ke la universo ne povas esti konsiderata kiel statika, kaj ke ĝi ne troviĝas en ekvilibro. La kosmologiaj modeloj naskitaj el la ĝenerala relativeco permesas interpreti laŭ kontentiga maniero proprecojn de l'universo, kaj precipe la delokiĝon direkte al la ruĝo de la spektraj strekoj de l'galaksioj, kiu estas proporcia al ilia distanco. Tiu ĉi delokiĝo, kiu estas asimilebla al efekte Doppler*, montras, ke la universo nuntempe plietendiĝas; sed nenio permesas aserti, ke ĝi en iu momento komencis estis densigita en malgranda volumeno, kio trudiĝas nek per la teorio nek per la eksperimento."

* La efekte de Doppler-Fizeau permesas mezuri la radiadan rapidecon de l'elradianta fonto (stelo), kompare kun la riceva organo (Tero), kiu provokas delokiĝon de l'spektraj strekoj, ĉu direkte al violkoloro (en kazo de alproksimiĝo), ĉu direkte al ruĝo (en kazo de foriĝo). Tiu efekte liveras krome indikojn valorajn por studi la rotaciajn movojn proprajn de astroj kaj la rivoluajn movojn de iuj astroj ĉirkaŭ pli malpli najbaraj astroj (stelduoblo).

Sekvas alineo, en kiu Lequeux diras, ke tio, kio validas por nia sunsistemo (pri etendiĝo), ne nepre validas ankaŭ por aliaj astraj sistemoj.

Kiel ĉiam en la pasinteco, ankaŭ en nia nuna epoko la scienculoj antaŭeniras per palpaj paŝoj, ne volante firme aserti, ke tiu aŭ alia hipotezo estas la ĝusta. Vidante multon pli klare ol ni laikoj, scienculo estas pli modesta ol ordinarulo, en multaj kazoj. Li estas tolerema kaj kontraŭ-dogma, kiel ni SAT-anoj estas rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj, se ni obeas la regulon de la unua statuta paragrafo.

Dume restas por ni, vivantaj en epoko, kiam daŭre ankoraŭ homoj subpremas siajn samspeculojn, kaj dum kiu lingvaj baroj malhelpas la inter-alproksimiĝon inter la popoloj, la tasko per Esperanto kontraŭagi naciismon, rasismon kaj socian maljuston.

N.B.

Verkoj de k-do N. Bartelmes

- * Goethe. Faŭsto I (traduko)
- * Petro (lernolibro)
- * Diablidoj (rakonto)
- * Unua legolibro
- * Juneca Ardo (rakonto)
- * Vartejoj
- * Ne plu ludo (novelaro)

n. bartelmes

poemaro



EN OMBRO FLAVA

En la flava ombro, dum suno cedas
Apud marĉeto dubluma,
Kie arbustoj nigretas
Dum horo noktiĝa, frostuma, -
Kuŝas dormanto.

En la flava ombro malpreciza maso,
Buliĝinta, malgraseta korp'.
La haŭtovakskolora : flaveta kiraso,
Sekiĝinta foli' sub branĉaro de sorp',
Li kuŝas, dormanto.

Kvieton reflektas mien',
Palega vizaĝ' de elsuferint',
Kiun afliktoj, dolor' kaj ĉagren'
Pelis al vivon fuĝanta blind' -
Velka dormanto.

Kantas supre en foliar'
Merlo frivole antaŭ ripoz',
Pigo babilas kun la najbar',
Bufo flirtas kun akva roz'.

Mutas dormanto.
Transe de l'marĉo vokas koturn' :
Ĉu ci jam dormas, ho, karulin' ?
Lulas la idojn patrina sturn',
En tru' leporet' jam forkaŝis sin.
Flavas dormanto.

Neniu la karnon ŝimantan atentas,
Sternitan tie sub sorpobranĉaj...
Vekiĝi ĉu ci fine konsentas,
Post sesdekhora dormad' apud marĉ' ?
Mistera dormanto !

Ve! al arbara mallum' ci pilgrimis,
Plena de antaŭsentoj malĝojaj ;
Tedite, daŭrigi la vivon ci timis,
Forvagis marĉeten tra ŝlimoj senvojaj, -
Laca dormanto.

Kaj nun sur kuŝeno el musk' cin kaptprenas
 Skue-balance la vent' kapricul' ;
 Cian dormegon ĝi tamen ne ĝenas,
 Maso sensanga, sen-vivflua bul' :
 Polva dormanto.
 Mortis! palpe konstatas hom',
 Kiu celas matene al kamp'.
 Kaj en poŝoj li serĉas pri nom',
 Sign' origina, civita stamp'.
 Mortis dormanto.
 Mortis ĉe l'marĉo, ekstersocie,
 Nerimarkite de l'homa rond',
 Homo maljuna, vivon-defie,
 En ombro flava, sen horizont' -
 Dissolviĝanto.

KOMPATON !

Kompaton por ili, senhoma skurĝulo,
 Avida ŝtelisto de l' teraj riĉaĵoj !
 Kompaton por viaj kun niaj infanoj !
 Ĉiuj naskiĝis ili por vivi en lum' kaj trankvilo, -
 Por doni stampon, signifon al la Nova epoko !
 Kial en absurdo, obstino detruu tion,
 Kion en abundo produktis la tero ?
 Detruu ĝis la radiko per fajro kaj cindro
 Tritikon ondantan sur kampoj riĉaj je humo ; -
 Detruu dometojn, en kiuj familioj
 Sian kvietan vivon daŭrigi streĉiĝas, -
 Kabanojn de laboristoj ŝvite penadantaj por
 Pana akir' ĉiutaga...
 Detruu florantajn junulojn, kies sola deziro
 Rideti al suna mateno kun helaj okuloj lumantaj.
 Kompaton por ili ! ni vokas al kruda murdisto.

MOZARTE (°)

En ĝardenet' kun rozbarilo,
Malantaŭ plaĉa sikomoro,
Sub parfumet' de kamomilo
Sulkigas brovojn di' Amoro.
Sufokis lian gamon faŭno,
Ĵetante blekon de ĵaluz'...
Dum tra la rivereta ŝaŭmo
Filtriĝis hela rido ĵus.
Naiva lud' de l'kapridinoj
Maljunan lupon strange ĉarmas,
Kaj sub fluecaj pelerinoj
Korpetoj amfibiaj varmas.
Bronzfarbajn krurojn streĉas knabo,
Pafarkoŝ levas ĉasemul'.
Ho mir'! Konfuze zumas kapo,
Larmeto ĝenas en okul'.
Amor' sentema estas bubo,
Lin fluto reven ekzorcizas ;
Ne grumblas plu maljuna lupo, -
Pafarkuleto lin surprizas.
Kaj l'akvoj ondas, perlas, plaŭdas,
Senpaŭze birdoj ĝojtriladas,
Koncerton ni plej ravan aŭdas
Kaj luliĝante kunvibradas.

- (°) Mozarte = laŭ maniero de Mozart.
Volfgang Amadeo Mozart, plej genia kompon-
isto de ĉiuj tempoj, vivis de 1756-1791
en Salzburgo kaj Vieno. Tiu ĉi, kiel la
sekvintaj poemoj, estas humila omaĝo al
Arto, kiu estas sen Patrio.

BACH (°)

Blondul-kapetoj mute konfuzitaj
Sin klinas super lumo de kandelo
Flagranta preter lacaj, eluzitaj
Vizaĝaj trajtoj, frunto en malhelo,
Okul' rigida, sur la buŝ' salivo.
Kadavrotuk'. Silent'. Forpasis vivo.

Almozulin' malforta kapsubtenas
Sur la kuŝejo jen la viron mortan,
Per siaj ploroj ŝi lin mute benas,
Sen spiro gapas la infankohorto.
Por ĉiam ? Por eterne ? Restas truo,
La penso haltas ; haltas ĉia fluo.

Cementis sub kuŝej' betonan plankon
La temporad' ; kandela seb' forflosis.
Kaj tra orgena muĝ' ni aŭdas dankon,
Ĉar eternec' nenian tombon fosis.
Al la vivantoj turnis sin mortinto,
Trombone vokis sur plej alta pinto.

Ho, venu, vidu, miraj vi amasoj !
La morto estas stranga iluzio !
La timon venku, kaj sur novaj bazoj
Vi paŝos supren, kaj vi estos Ĉio.
Cimbaloj tintis, la orgeno muĝis,
La sun' ekbrilis kaj la nuboj fuĝis.

- (°) Johano Sebastiano Baĥ (Bach), genia muzik-
komponisto, vivis de 1685-1750, plejparte
en Meza Germanio.

BEETHOVEN (°)

Trifoje pugnīs kontraŭ mia pordo
Krudmora vir'. Trifoje krevis kordo
Sur mia instrument'.
Laŭ kia leĝo, - sakrament' ! -
Rezistis la martelon pord',
Dum saltis kord' kvazaŭ risort' ?!
Pluver' glaciigis stalaktite
Sur febra frunto mordita de l'splen',
Violonĉel' ĝemis intermite,
Veis la basoj pro surda ĉagren'.
Vento kaptigis en torda harar',
Mire pro tiom da kontraŭstar'.
Flutoj, hobojoj disŝiris l'aeron.
Kornoj fanfaris por ĉasi ĥimeron.
Lacegas la korp' kaj surdiĝas orel',
Sed frapas amboson senĉese martel'.
Kaj la ritmo eksaltas, peliĝas en tromb',
Svingiĝas senfinen, transnuba balon'...
Ĝis ĉio eksplodas kiel ŝpruca bomb',
Sub kupra enfal' sin estingas violon'.
Nenia ripozo, nenia silent' -
La frunto levita al firmament',
Libera titan' kun vidanta okul',
Li Dion provokas, hom-ribelul'.
Martelas la pugno kontraŭ la pord'.
Sur mia piano rompiĝis kord'.

- (°) Ludoviko fan Bethoven (v. Beethoven)
naskiĝis 1770 en Bonn kaj mortis 1827 en
Vieno. La plej universala genio inter la
komponistoj.

ŜOPENE (°)

Malgaja, sed kun nedirebla ĉarmo
En la mallumaj brun-okuloj,
Sin klinas super lit' vizag' sen larmo,
Pala virin' kun lipoj brulaj.
Knabeto nigrabukla tie febras,
Kaj konvulsia tuso lin sufokas.
Lin savi, lin konservi viva nepras,
Eĉ se dum nokt' la strig' fatale vokas.
Kaj spite logajn, anĝelecajn revojn,
Kaj malgraŭ femantel' el sorĉa land',
Magi' kun ĉiuj bengalaĵoj krevu ! -
Ne pagas knaban vivon diamant'.
L'infan' ne aŭdas de l'patrin' singul-ton,
Li vidas nigran kavalkadon pasi,
Al panjo ne demandas li konsulton ;
Largiĝas la okul', li spiras spasme.
La ĉevalhufoj frapas, tintas spronoj,
Sovaĝaj kavaliroj rabas knabojn.
De l'glav' kaj vipobatoj akraj sonoj
Ne povas kaŝi tiujn monstrajn rabojn.
La frunt' de l'knabo estas ŝvitbanita,
Virin' ekstremas, plorpetegas savon,
Preĝumas en singulto intermita : -
Ho, prenu, prenu tutan mian havon,
La monon, gloron, belon kaj talenton,
Nur unu solan ne, modestan spiron
De mia lasta knab', la sendefendan
Protektu kontraŭ rab-akiron ! -
Sed mire ĉe la mur' paŝtel' diskreta,
Portret' de eta princ' tra roza ambro
Rigardas, sub la pala frunt' rideto.
Miksiĝis dolĉo kun amar' en ĉambro.

- (°) Laŭ la maniero de Ŝopen (Chopin). Frederiko Chopin, poldevena, vivis ĉefe en Parizo (de 1810-1849). Pri li Henriko Heine skribis :
"(Improvizante ĉe la piano) li estas nek polo, nek franco, nek germano, li perfidas tiam multe pli altan originon, oni rimarkas tiam,

BRAHMS

Jen homo el severa nordo
Kun forte finstreĉita kordo.
Soprana voĉo klarsonora,
Rebrilo hela, multkolora.
Matura frukt' sur kamp' ondanta
Kaj super ĝi homvoĉa kanto.
El korprofundo ĝi ekkreskas,
Abrupte fulmas, inkandeskas.
Lirik' jen ŝvebas malavara,
Muzik' kun tono dolĉ-amara.
Sed en klasika form' ĝi bolas,
Jen senbridiĝas, jen kontrolas.
Brahms emocian kordon tuŝas
Kaj nin en songostaton puŝas.
Dum apre uragano blovas,
Subite mildo sin enŝovas,
Rideto, larm', ĝemeta spiro, -
Kaj rege la Olimpa viro.

ŜUBERT

Lernpaŭzo, voĉlanug' ne plu en vibra ĝojo
Tra l'klasfenestro de l'vilaĝlernejo vojas,
La knaboj jen en ludpetol' tra l'korto svarmas,
Sed l'instruist' post okulvitroj kaŝe larmas.
Por li la vin' amaran finon fru-atingos
Ne plu sugeste brakon tra l'aer' li svingos,
La ritmon al kantemaj buboj indikante,
Por li post skerca vigl' jam venas la andante ---
La granda paŭzo, tiu de l'silent' ĉiama,
Nenia kanto plu pri amsopir' ekflama.
Vilaĝ-intim', tilioj, de l'alaŭdoj trilo,
Foriĝas, nebuliĝas en ekvelk' malbrilo
Senmorta simfonio restas nefinita
Kaj amplenum' kaj art' kun sia glorzenito.
Post vitroj malsekiĝis de l'kantist' okulo,
Tributon ŝuldas al tombej' la geniulo.

ke li devenas el la lando de Mozart, Rafaelo,
Gete (Goethe), lia vera patrio estas la fantaziujo
de l'poezio..."

^
SUMANN

Brulet' jen vira, kaj jen ina, fontas
- du sentkompleksoj loĝas lian bruston
kaj ambaŭ en ĉasludo sin renkontas
kaj donas al esprimo tonan ĝuston.
Sovaĝe tondras jen sonŝtupoj krudaj,
Senĉenigita kuras bojantaro,
Dum milde jen, sur tintaj kordoj prudaj,
Sun' vesperiĝe dronas en la maro -
La en Rejnlando gaja karnavalo
Miksita kun danubaj dano-sekretoj
Trapasas kiel tromba akvofalo,
Kun rozoj la studentaj ambiletoj,
Tagiĝas ; volvas sin el peltojn froste
Rondet' junula sur la griza strato.
La vinfakturon oni pagos poste,
Kiam monuj' en pli prospera stato.
Muziko, ha! La Muzo tro postulas...
Feliĉe Klara helpas, lin apogas.
Sed Rejnriver' majestajn ondojn rulas,
La viron ĝi fascinas, streĉe loĝas.
Malpuraj akvoj, kion vi plaŭdadas ?
Pri kio viaj sonoj memorigas ?
Per ĉiuj ritmoj vivon ĝi invadas...
Sin tien ĵeti... kiel ĝi efikas !

Eterna nokto lian cerbon volvis.
Post apogeo sekvis klin' fatale -
Neniu, ha, problemon tiun solvis
Najbaras ja Geni' frenez' iale.

AVIADO-BALADO

Inspirita de la orient-azia
milito.

Flugu, flugu, vin distingu
Brile el ĉiela fon',
Tra timiga flama ringo
Kuru, fiera alcion'.
Akrobato de l'aeroj,
Klinu ventron flirte vi,
Jen logate de ĥimeroj,
Jen de rava iluzi'.

Pendas korpo streĉrisorte
Ĉe l'finaĵ' de paraŝut'.
Movas sin libertransporte
Tra l'etera malakut'.
Kial brulŝirigaĵas nodoj,
Kial haltas la motor'...
Dum ĉe fremdaj antipodoj
Kantas krud-sovaĝa ĥor'...?

Flam' cirkulas senkompate
Tra l'vejnar, grincas rost',
Tordas dratoj sin malŝate,
Nudan karnon ŝiras frost'.
Korpoj luktas van-espere
Kontraŭ elementa fort',
Ili post barakt' prefere
Lasas sin al tranĉa mort'.

Kaj susuras febraj revoj
Tra l'eter' sen intermit' ;
Nek deziroj plu nek devoj
Nin turmentas kun incit'.
Serĉas ni liberon plue
Super de l'destin' obtuz',
Celas firme ni, senskue,
Venkocertaj, al polus'.

MONSTRAĴOJ

Nenies ĝi estu ĉi-ter', se ne mia,
Parolis el saŭroj la plej reliefa,
Koloso impona, el ĉiuj la ĉefa.
Kaj preplatigante terenon, konscia,
Pereon ĝi semis ĉe l'birdoj kaj plantoj,
Ĉe l'marĉ-reptilioj kaj step-elefantoj, -
Eterne senspira, ĵaluza, envia.

Sur vergo kokosa simio etende
Priflaras explore anuson najbaran,
Admiras dorlote veluron felharan.
Krakbruas branĉar', kaj la brakojn defende
Ekstreĉas ĝi kontraŭ danĝer' nekonata :
- Al mia animo cin montru kompata !
Pro timo hundbojon aŭdigas ĝi plende.

La miliardulo per ŝvito kaj sango
De laboristaro senrajta sin nutras ;
Rezervoj vivdonaj blokitaĵ forputras,
Ĝis ŝtorme sin levas popola lavango,
Kolere disrompas koncentrojn rabistajn,
Balaas la tronojn fiere rezistajn,
Kaj kapoj tranĉitaĵ portiĝas sur stango.

Vi pacon al iĥtiosaŭroj predikas,
Proponas al sanga rabul' armisticon...
Al trompa raguo almiksas la spicon,
Parolojn per stranga maskado implikas.
Ne ŝparas aplaŭdojn ŝafeca publiko
Al frazoj pri deco, etik', estetiko -
Ja gestoj konvinkas, dum vortoj muzikas.

HIMERO KAJ VERO

Hej! ŝip' estas for en la mara direkt' !
Vel' ŝvelas, favoras la vent' al projekt'!
Ĝin sekvi, atingi - ho, rev', utopi' !
Al transaj regionoj ja forvelis ĝi...
Sed zumas la kap', kaj invadas ĝin fulgo ;
Ne petas pri paŭzo mi, halto, indulgo.
Mi ĵetas min turbe en ŝaŭman riveron,
Plenmezen, por senti la ondo-severon ;
En centron kirlakvan, gluteman, grimacan,
Serĉante la lukton, la premon minacan.
Sed fluo ekstagnas, rigidas la ondo,
Dum ŝip' jam foriĝis al bord' de l'estonto.
River', ve! marĉiĝas, sin ŝanĝas je lago,
Ĝi putras perfide de tago al tago.
Kion fari, por savi sin el la malbono,
El prema vizi' de l'ŝlimiĝo, de l'drono ?
Angori, langvori, stertori, fetori ?
Ne, moki l'fatalon kaj spit-bonhumori !
La knaboj baniĝas dens-apud la bordo,
Nur duon-aŭdacaj pri naĝa rekordo ;
Ili laŭdas kirlfluon el vasta distanco
Kaj ludas kviete, sen ekstravaganco.
Ne spertis jam tiuj la takton de l'vivo,
Al junaj ne ŝajnas rapida la drivo.
- Ho, helpu! mi dronas! Ĝin volus mi krei,
Sed voĉo paneas ; kion ili povus scii !
Nu, dronu, stultulo, en tomb' memfarita,
Ili mokus kun tembro kruele incita...

Aŭtunas ; eĉ frost' sin anoncas obsede,
Evitos mi frapon neniarimede.
Kaj ili, sekuraj, ĉe l'strando petolas,
Sursable l'elastaj piedetoj molas -
Printempo de l'vivo, promes' kaj regalo,
Respondo al ĉiu demand' pri kialo.

LA STUDANTO

La lampo dubmalforte lumas,
La forno flave, rampe fumas,
Ĉe tablo sidas mi krudligna,
Ribelas kontraŭ vok' indigna :

- Skribu, skribu !

La libroj amasiĝas tie,
Grizaĉaj, flavaj pergamenoj ;
Malmultaj nur da helmienaj.
Sin trudas ili, premas, gestas,
Dum kline mi ĉe l'tablo restas :

- Skribu, skribu !

La manoj krispas spasme, nerve,
La lip' prononcas sonojn verve.
Mi literumas vortserion,
Mi parkerumas, aŭtomate,
Kaj subaŭskultas raŭkan krion :

- Skribu, skribu !

De ink' malsekas la papero,
La plumo skrapas sen fiero ;
Peziĝas man', tumultas kapo,
Kaj skandas super mia skrapo :

- Skribu, skribu !

NI LABORU TRANKVILE !

Dum penade ni obstinas
Super tasko sen komparo,
Ŝvebas penso pri l'idaro :
Kion sort' al ĝi destinas ?

Ĉu ĝi laŭdos la klopodojn,
Vidos sencon, idealon ?
Aŭ ĉu ĝi akcelos malon ?
Ĉu ĝi sekvos novajn modojn ?

Vane ni turmentos cerbon,
Dum ni penas sur la vojo...
Restu do serena ĝojo
Vidi kreski junan herbon !

KANTO PRI ESTONTO

Muziko de Beethoven

Ho, kiel mirinde revas
Lumigita mia vid'
Kia brila sun' sin levas
En ĉiel' sen hipokrit'
Anoncite de l'prapatroj
Temp' benita venis nun
Ĝojoplenaj kaj beataj
Vivas ĉiuj sub la sun'.

Floroj burĝonintaj svarmas
Apud murmuranta font'
Kaj pli dolĉe rozoj ĉarmas
Majstre kantas birdomond'
Por ronddance amuziĝi
Vokas ombro de l'arbar'
Ĉio ŝajnas nin feliĉi
Fund' arbara, val' kaj mar'.

Ne plu murdo inter fratoj
Ne plu sango, ne plu plor'
Ekaŭdiĝas flutkantatoj
Milde venas vesperhor'
Ho, mirinda kor-inklino
Ĉiuj koroj en unu'
Venkokrie ŝprucos fine
Amo en potenca flu'.

Tradukis N. Bartelmes.

BALADO

Ŝipet' sermasta,
Ni drivas sur ocean',
Espero lasta
Biskvita pan'.
La gorgo sekiĝas
Pro senta amar',
Paroloj malriĉas
Pro pensa malklar'.
Kien perdi nin
Malluma sort'.
Ĉie ja dentojn
Grincigas la Mort'.

- Ŝipestro ! krias
Freneze l'anar'.
Ŝipestro! Ŝipestro!
Okula par'
Sin boras profunden,
Ŝtala rigard',
Okuloj sen timo,
Krateroj sen ard'.

- Ni drivas abismen,
Pereos sen glori
Ŝipestro, Ŝipestro,
Direktu nin for !
Gigantaj ondoj ŝaŭmas transborden,
Magneta nadleto obstinas norden...

Sarkasme ridas la kapitan'.

- Panik' ? Malespero ?
Gvidilon en man'
Sonigas komandojn li ;
Vibras l'aer'.
Ondegojn, ŝipanojn
En tromba kirl'
Sorĉtene estras
Velo el fer'.

Kolombo kaj Vasko, Lindbergo kaj Berd(°),
Riskemaj venkantoj en ŝtorm' kaj dezert',
Penetrantaj sferojn,
Realigantaj ĥimerojn,
Forrompantaj barierojn.

Kaj vi, obstinaj ŝipestroj de l'penso,
Kaj de l'vivo socia maldorma konscienco !
Instigu kaj veku, instruojn etendu,
Direktu, ordonu, komandojn elsendu,
Kaj kiel per tranĉa glavo vi fendu
Timemon, heziton kaj malhonestemon,
Por mondo pli bona disĵetu la semon !
Postrestu malklero, mizer' kaj malfido,
Antaŭen kaj supren sub sperta gvido !

(°) Byrd.

BONVENON AL LA ANOJ
DE LA 15a KONGRESO DE S.A.T.
en PARIZO - 3-8 Aŭgusto 1935.

Somero-Aŭgusto SAT-anoj kongresas
El tuta mondo ili ariĝas
Kiom iliaj rimedoj permesas
Tempo kaj mono por tio sufiĉas.

Krizaj jaroj venas kaj pasas
Trudas oferojn al nia anar'
Tamen regule ili okazas
Niaj kongresoj en ĉiu jar'.

Nun la Dek-kvinan fojon logas
Ardaĵ deziroj al ĝoja renkont'
Al Parizo l'afiŝoj vokas
Brila metropolo de l'mond'.

Sulkon ni fosu kun vigla spirito
Tie, en gvida centro de SAT !
Akceptinto de l'kora invito
Estu bonvena ĉe ni, Kamarad' !

MONDA KANTO DE LA PACO

Himno de la Popoloj de la Mondo

I

Infanoj vi de l'tutplanedo,
Forestu militkonspirad' ! -
Ni kantu pri la vivkvieto,
Pri l'feliĉec' en pacostat' !
L'erar', malamo aŭ venĝemo
Lulilojn ne makulu plu.
Ni novaj de l'estonta flu'
Alvoku al konfid-ekstremo !

Senarma kunagant'
Kun libersent' en kor',
Eksonu pura nia kant',
Jen monda pac' en ekflor' !

2

Junuloj, estontec-homaro
Nek sang', nek fajro en la sulk' !
Rompiĝu glori al krimofaro,
Milionkadavra naŭza fulg' !
Laŭdkantu ni standardon,
Ĉi tiun de l'natur' en flori.
Ĉesigu de l'naci-kolor'
Malluman histori-rigardon !

Senarma kunagant'
Kun libersent' en kor',
Eksonu pura nia kant',
Jen monda pac' en ekflor' !

Paroloj de Pauline Deroche.
Adapto Esperantista de N. Bartelmes.

3

Virinoj sur la Tera tuto,
 Ne cedu plu al honta sort' !
 Patrin', rifuzu sen diskuto
 Naskadi idojn por la mort' !
 Leviĝu ! mond-civitaninoj :
 Malnova leĝo mortu for !
 Ni rajtas vivi sen teror',
 Nuliĝu la militdestinoj !

Senarma kunagant'
 Kun libersent' en kor'
 Eksonu pura nia kant',
 Jen monda pac' en ekflor' !

4

Amikoj, en la tuta mondo
 Resonu himno de l'fratec'.
 Formiĝu nia bela rondo,
 Liberon kantu ĝi sen ĉes'.
 Al ni honor' kaj glora difin'
 Konduki genron de l'homaro
 Al estonteca suna klaro,
 Al nobla kaj simpla venkdestin' !

Senarma kunagant'
 Kun libersent' en kor'
 Eksonu pura nia kant',
 Jen monda pac' en ekflor' !

Kunligis nin Esper'
 Je homoj sen katen'
 En dev' komuna nia pen'
 Pri Amo kaj Liber' !

POR LA 15-a DE DECEMBRO 1958

Sopirantaj homoj, ĝemsopirantaj
kiel bestoj fermitaj en kaĝojn, -
Iuj stomakkonsciaj pri peco da pano,
Aliaj pri paco, frateco revantaj,
Kreduloj pri vivo pli hela, pli bela, -
indulgo, feliĉo, trankvilo, kaj varmo.

Junaj, maturaj, alt-aĝaj -
ili pasis, pasadis, mortintojn
adiaŭis, transprenis laborojn,
esperis kaj agis, sinsekvis, kaj ĉesis.

Alvenis la fortaj, trumpetojn
svingantaj, kun fanfaronado
bruega, trudega, popolojn
trompante, mokante, kaj humiligante.
Kaj kiam diskrevis maldaŭra potenco,
vekiĝis unuopuloj
kun alta konscienco,
nur malfacile sin levis el buloj
da disen blovitaj, de l'ŝtormo epoka
falĉitaj nuloj.

Unuopuloj kun krea poveco,
Vojpreparantoj al luma estonto, -
Pasis ili !... ĉu pasis ?
Zamenhof --- Lanti !!

Restas pri ili, pioniroj homaraj,
Bildo de ekster la grego marŝantoj...
Vive memoru ni, dum niaj festoj,
Karajn portretojn.
Ligu kun sentoj fundan
pripenson de kialo, neceso,
havu konscion pri vojo kaj celo.

Memorŝargite

Paŝu ni supren, kun mens' en ribelo !

POR LA ZAMENHOFA BANKEDO

- Decembro 1963 -

En temp^o kiam tagoj al nokto egalas
En varma kaŝej' sin tigridoj instalas
kunvenas por ĝoja festen' ni Krimee
Per manĝo regalas nin, - ankaŭ idee
Kun ventro ŝvelanta kaj likvo purpura
Tra l'gorĝo verŝita kun intenco pura
Ni sunon forŝvitas kun gaja humoro.
La pens' nebuliĝas dum festas la koro
Sed tamen obstinaj ĉar ĉiam abstinaj
Por iuj la akvo kongruas kun vinoj
Geknaboj multnombras invadas junaĝo
Degelas glaci' kapriolas la saĝo
Dek-kvina decembro, memorojn ci vekas !
Instigas, sugestas, persiste substrekas
Fidelaj ni restu, en agoj obstinu
Homar' ja vojiras laŭ sia destino
Forpasas horet' en senĝena babilo
Nektaro nin trompas pri ĝen', malfacilo...
Bonvenas hodiaŭ la paŭzo al bravaj
Bonvenas eĉ fanfaronetoj negravaj...
La ĉiutagan rutinon ni spitas
Kaj salti translunen neniel hezitas
Kun glasoj levitaj kaj apostrof'
Ekkriu ni : "VIVU L.L. ZAMENHOF !"

POR LA 12-a DE DECEMBRO 1965
en strato Krimeo
(aù la balado de la ciferoj 91-95)

Jam ree por modesta bankedeto
Ni troviĝas Krimee en kompleto
Malnovaj vizaĝoj de tre longe konataj
Miksiĝas jen kun novuloj malsataj.
Bonvenon aparte al tiuj novicoj
En niaj ĉiam densaj ĉetablaj vicoj
Kuniĝas ni ne nur el Babilono,
El Sejn'-kaj el Sejn-kaj-Ŭaz-departementoj,
Laù tradicia loĝdeveno de persono
Sed verŝas ĉi tien nin novaj segmentoj :
Distranĉitaj ni estas parizregionanoj
Laù rigor-administraj reformo-planoj.
Ni nun venas el la Marn- kaj Ŭaz-valoj,
Kie floras en majo plej ĉarmaj konvaloj,
Ankaù venas el Sejn-Sankta-Dionizo,
El Sejn-altaĵoj, kaj... lastfine... el Parizo
Vizaĝoj malnovaj de tre longe konataj
kun buŝoj tiuokaze ĉiam festene malsataj...
Serioze! por Zamenhofa honoro
Ni ŝmiru belbrile nian motoron,
Kaj kia ajn estu nia haùtkoloro
Travivu ni feston en bona humoro.
Nian lingvon kun ama zorgemo ni flegu,
Gazetojn ni ne nur abonu, sed legu!,
Estu hodiaù nia solena promeso,
Ke peno ni pri membrara progreso ;
Admonas nin Zamenhof kaj Lanti Eùgeno
Al lukto sur nia granda areno !

POR LA ZAMENHOFA BANKEDO
- Decembro 1969 -

Rapide fluas la jardekoj
Kun datrevenoj multesvarmaj
Amaraj ofte la revekoj
Ne nur instruaj, eĉ alarmaj.

Surprizas kosma rondvojaĝo
Teknika venk' de l'homspirito
Sed restas sur la ter' malsaĝo
Plu daŭras mizereg', milito.

De kiam Zamenhof naskiĝis
Forpasis longa historio
Popoloj tremis, malfeliĉis
En longetenda agonio.

Kreaĵo Zamenhofs frostis
Ĉar uraganoj ĝin minacis
Penegojn al disĉiploj kostis
Grupeto nur persist-aŭdacis.

Denove Goliat' provokas
Malgranda aro firmsintenas
Sur la racio sin apogas
Dum popolaro plu azenas.

Tamburu ni, ĝis limoj falos
Ĝis preter trudoj kaj perfortoj
Komuna lingvo sin instalos
Rompante ĉiujn misakordojn.

POR LA ZAMENHOFA BANKEDO
- Decembro 1970 -

Event' mirinda nin obsedas,
De monatkelko ni posedas
Armilon por karlingva vivo
Anar' disponas nun pri PIV-o
Akceptu dankojn ĉefaŭtoro
Li plenmeritas je honoro,
Dum pensoj niaj retrovagaj
Trans banalaĵoj ĉiutagaj
Ligiĝas ja kun Varingjeno
Memor' pri multjardeka ĉeno
De simpla Zamenhofa vorto
Al nuna kreska esprimforto
Kaj inter la honornomaro
Ja lanti supras, tre elstara :
Pro lia klara anticipo
Ekĝermis ĉi vortar-ekipo
Pli lingvolerte ni komputas
Babilas, rimas, brudiskutas
Pli vortabunde nin esprimas
Ne antaŭ ardaĵ temoj timas
Infanajn ŝuojn ruben ĵetas
Sur novan vojon firme tretas
Ĉar nun disponas ni pri PIV-o
Kaj hele lumas perspektivo
Por de l'movado novprospero
Por Esperanta mondkonkero
Fekunda estas lingva riĉo
Fruktiga ĝia disvastiĝo
Kun tia instrument' perfekta
Konstanta nutro intelekta
Do PIV-on ne nur manen prenu
Sed daŭre por uzado tenu !
Jen mia tre insista pledo
Dum tiu ĉi honorbankedo.

POR LA ZAMENHOFA BANKEDO

- Decembro 1971 -

Dissaltos muroj de miljaroj
Profetis grave Zamenhofo
Terglobo en senhalta movo,
Kaj same ĝiaj loĝantaroj.
Pro kio tiu fera baro ?
Pro kio tiu kontraŭstaro ?
Regas pasi' super logiko,
Malvasta mens', jen malamiko !
Nacioj serĉas propran gloron,
Postulas vantane mem-adoron,
Regante stultajn civitanojn,
turnantaj sin en cirkloj klanaj.
Rasismo estas ties frato,
kruela besto sen kompatato.
Ni luktas kontraŭ tiuj plagoj,
per vortoj, skriboj kaj per agoj.
Ni fidas venkon de l'Racio
en evolu' de l'istorio.
Aperos tiam apogeo
de l'geniula lingvokreo.

Festenu do kun apetito
en ĝojhumor' sen intermito ;
kaj lingvo fluu glate, plaŭde,
korekte, - ĝuo por la aŭdo ;
ĝin delikate manipulu :
Jen, kunteblanoj, ĉefpostulo !

POR LA ZAMENHOFA BANKEDO
- Decembro 1972 -

Jam eblas revuadi jaron,
Konkludon tiri kaj komparon
En tiu memorinda dato
Vokinta nin al Krime-strato.

La jaro sepdek-dua pasas,
Memorojn multajn al ni lasas ;
Kulmine Kuopi-kongreso,
Nekontestebla plensukceso.
Por nia Rond' fruktportaj semoj,
Nin animantaj kontraŭ premoj.
Aŭtoritat' nin piedpuŝas,
Popolon nia vok' ne tuŝas.

Sed necedeme ni persistas,
Al ĉia kontraŭec' rezistas.
Pludaŭras la obstina lukto,
Por venk' de l'Zamenhofa frukto.

Ideo vivas, il' uziĝas,
Esprimo lingva brile riĉas.
En Zamenhofa datreveno

Rigardu onton kun sereno.
Ni tostu, junaj kun deklivaj,
Kun sent' kaj vort' superlativaj.

POR LA ZAMENHOFA BANKEDO

- Decembro 1973 -

Al vintro cedis la lokon aŭtuno,
Avare tra nuboj penetras la suno.
Plu skuas la praaj instinktoj popolojn,
kiuj kreas kaj pereigas idolojn.

Kiam regos racio de super kaprico,
kaj venkos saĝeco en unua vico ?
La politikistoj regas senbride,
ĉar ilin la homoj sekvas blindfide.

Jen Zamenhof provis rimedi la mankon
Ni ŝuldas al li la plej varman dankon...
En tiu perturbo, en tiu ĥaoso
Li montris la vojon, li naskis etoson,
Ĉi tiu kristalas en nia kunveno
Sub verda stelo en kvieta sereno.

Ni junaj, maljunaj festenu konkorde
Kaj staru rokfirmo, pli kaj pli forte,
kun celkonscio paŝante sur vojo,
Kiun ni elektis kun konvinko kaj ĝojo.

POR LA ZAMENHOFA BANKEDO
- Decembro 1974 -

Jen kunvenintaj ni por bankedi,
Dum kelkaj horoj por mondlingvo pledi
Por nia neŭtrala interkomprenilo
Defie al la politikista sterilo.

Ministroj grumblas pri lingv-imperiismo
Neniu ja rigardas tra nia prismo...
Protestoj burleskaj kontraŭ angla sintrudo,
Sed vola ignor' de l'logika konkludo.
Jen Zamenhof proponis la solvon racian,
Sed registroj protektas la rubaĵon nacian.
SAT-anoj decidis ĝis venko batali
Por novan socion en mondo instali,
Kun help' de la Zamenhofa donaco,
Survoje al universala paco.

Persisti - jen la nuntempa devizo,
Persisti - por venki super la krizo.
Forlasas nin iuj en monda perturbo,
Malsupren glitetas membrara kurbo.
La velkajn foliojn tempesto forŝiras,
Kun freŝa branĉaro antaŭen ni iras,
Rompiĝos la fortikaĵoj de l'stulto,
Kaj helpos nin venki popola plimulto.

POR LA ZAMENHOFA BANKEDO
- Decembro 1977 -

Solenis multon ni ĉi-jare
Pro rondciferaj memordatoj
Kaj krom la kalendar-konstatoj
Ni turnis pagojn vidoklare.
Solenis multon ni ĉi-jare...

Sesdeko pasis de post morto
De l'kara majstro Zamenhofo,
Lasinta verkon de venkpovo,
Kun ĉiam freŝa vivoforto.
Sesdeko pasis de post morto...

Kaj naŭdek jarojn da ekzisto
Esperantistoj agis klere,
Sur tuta ter' disŝut-konkere
La kampon plugas kun persisto,
Post naŭdek jaroj da ekzisto.

Kaj antaŭ sesdek mondon skuis
Reĝimŝanĝiĝo en Rusio ;
Marksista ideologio
Malnovajn bazojn fordetruiis.
Tempseto, jes, la mondon skuis.

Kvindeka estis SAT-kongreso,
Aŭgsburg' modele ĝin gastigis,
La agemulojn plu instigis
La vojon sekvi al progreso.
Kvindeka estis SAT-kongreso.

Kaj nunmonate, jen bonorde
Aperas - sen memorcifero -
Okcent sepdek unua numero
de SENNACIULO, - ĉu rekorde ? -
Jen ĝi jarfine ja bonorde...

POR LA ZAMENHOFA BANKEDO
- Decembro 1978 -

En jarofin', kun kelka distanco
Alvenis limdato por nia bilanco.
Ve, se rezultato ne pozitivus,
Se sur la voj', ni falete deklivas,
Kaj kontraŭul' nin per mokoĵ regalias,
Dum tamen plej vigle kun ard' ni batalas.
Ja venis la horo por fina kalkulo,
Kiel decembre ĝi estas regulo.

Ĉu fiere multiĝis disĉipla la nombro ?
Aŭ ĉu ni restis sunavide en ombro ?
Hodiaŭ, en tiu decembra mezo,
Kunvenis ni ĝojaj kiel por kongreso,
Tutpretaj por la festeno honore
Al hom' estimata karmemore,
Kiu donis al mondo rimedon unikan,
La lingvon por la pac' senprecedence efikan.

La doktor' al ni lasis trezoron plej noblan,
Esprimu hodiaŭ ni danksenton multoblan.
Kaj se vi scivolus pri la jara bilanco,
Vi daŭre aktivu : jen solvo kaj ŝanco !

POR LA ZAMENHOFA BANKEDO
- Decembro 1979 -

En ade kreanta, teksanta naturo
Elstaras fojfoje giganta staturo.
Ekmiras, kapfrapas la ordinaruloj :
Jen fenomen' ekster niaj reguloj !
Penetris en nian cerbon io nova,
Pro sia logik' nerezistipova.
Mondlingvo aperis en plena realo,
Sen falsa patoso, sen densa vualo.
Hodiaù ni pensas pri l'tiama ekiro,
Kiam Zamenhof paŝis al venkturniro.
Konvinki skeptikajn jen la temo,
Konstante semadi kun kontinuemo.
Sporade ekbrilas surprizaj sukcesoj,
Jen guto post guto sin montras progresoj.
Ne haltas en sia puŝado la fluo,
Inundas la tutan terglobon kun bruo.
Planedan lingvon mondanoj apliku,
Jam nun ĝi por paca ideo efiku.
Aŭdiĝu hodiaù, en nia medio
Nur zamenhoflingva belmelodio !

POR LA ZAMENHOFA BANKEDO
- Decembro 1980 -

Kiel ĉiam je l'sama dat', je l'sama horo
Kunsidas table ni kun festhumoro
Uzante lingvon de l'planed' racian
Omaĝe al aŭtor' de kreitaĵ' genia.
Ni anticipas sur la voj' zenita
De Zamenhof kun art' iniciatita.
Jes, mankas ofte por ekzerc' okazo ;
Ĉi tamen por sukces' necesa fazo.
Demonstri ĉie kaj en kontinuo
Gravecon de mondlingva evoluo
Konvinkas pli ol frazoj surpaperaj :
Ni estu pioniroj agliberaj !
Ve! malaperas multaj el l'anaro,
Funebras mute ni kun sent-amaro.
Forlasis nin kamaradino Suzana
Kun sia kondukt' tiel nobla, humana.
Helpemo estis ŝia funda trajto,
Subteno por humilulara rajto.
Meudon-arbardom' restas simbolo
Pri sindona, larĝanima ŝia rolo.

OMÂGE AL GASTON WARINGHIEN

Okaze de la Zamenhofa bankedo de la 13-a
de decembro 1981 en Parizo.

Logik' vivigis belan idealon,
Animis venkdeziron senegalan.
Pli kaj pli riĉa iĝis lingvesprimo,
Versiĝis flate en sentplena rimo.
Poluris Li laŭ form', muzik' kaj stilo
La lingvon kun kapt-elokventa brilo,
L'aŭtor' de montoj da eseoj, studoj,
Konvinkaj, sobraj en la finkonkludoj.
Forĝanto klera Li de novaj formoj,
Terminoj trafaj laŭ plej striktaj normoj,
Aŭtoro de verkar' ide-fekunda,
Sagaca, sprita kun elfos' profunda.

De l'vivo okdek jaroj flugforsonis,
Dum ĝojojn kaj afliktojn la poeto konis ;
Konfide je l'estont' la plum' senhalte
Deponis, jen kviete, jen ekzalte
Konsilojn saĝajn sur la pergamenon,
Aŭdace supersalte ĉian ĝenon.
En tiu ĉi de l'naskotag' memoro
Ni lin gratulu do kun varma koro.
En nov-jardeko voju li kontenta,
Pri l'lingva evoluo vigl-atenta,
Akceptu do, amik' nian omaĝon :
Eklaŭtu "Vivu" kaj ni turnu paĝon...